

Kun firmaj ideoj kaj ardaj diskutoj antaŭen

Skiza historio de Universala Esperanto-Asocio (UEA)

laŭ la revuo *Esperanto* (UEA) 1905-2002

Ĉu temas pri historio de nekutimaj sensacioj kaj skandaloj kaŭzitaj de homoj revantaj pri memproklamita grandeco, kiu povas nur fiaski?

De Andreas Künzli (Svislando)

La revuo *Esperanto* estis fondita en 1905 de la franca esperantisto **Marcel Paul Berthelot**.¹ La unua numero aperis la 18an de junio en Céret (orientaj Pireneoj). **Charles Lambert**² estis la redaktoro. Inter la enhavo de tiu revuo troviĝis Esperanta vortaro.

N-ro 21 estis publikigita la 5an de aŭgusto 1906 kun la administra adreso en Ĝenevo/-Bellegarde dulingve en Esperanto kaj la franca. La eldonoj de tiu jaro entenis ĉefe informojn pri la 2a Universala Kongreso en Ĝenevo kaj la paroladon de L.L. Zamenhof.³

La ĉi-sekva artikolo klopodas reliefigi esencajn diskutojn en la Asocio, kiuj fariĝis publikaj tra la oficiala organo *Esperanto* en la konscio kaj kun la atentigo, ke ne ĉiu detalo, ĉiu fakto, ĉiu dato kaj ĉiu nomo povas esti menciitaj, ĉar la raporto iĝus tro longa.

Periodo Hodler (1906-1920)

Post la malapero de Berthelot en Sudamerikon (kie li mortis en 1910) la gazeton transprenis **Hector Hodler**,⁴ filo de la svisa pentristo Ferdinand Hodler. La eldonoj de 1907 portis la administran adreson strato Bovy-Lysberg 8 en Ĝenevo (kie René de Saussure disponigis oficejon)⁵ kaj menciis Hodler kiel direktoron. Dum **René de Saussure**,⁶ frato de la fama lingvisto Ferdinand de Saussure, preferis resti en la fono kaj okupiĝi pri sciencaj aferoj, ĉe la fronto agadis Hector Hodler. La gazeto enhavis rubrikojn en diversaj lingvoj, krom en Esperanto, franca kaj angla ankaŭ en la germana kaj hispana. Ĉefaj temoj de tiu jaro estis la ideo pri la konsuloj kaj konsulejoj, kiel disvastigi Esperanton en komerco, scienco, armeo, eklezio, pacismo kaj inter la studentaro. Alia grava temo estis la agado de la “Delegitaro por la Alpreno de Lingvo Internacia”.⁷ N-ro 11 enhavis foton de Zamenhof. Aperis landa kroniko, literatura felietono, sed estis skribite ankaŭ pri politiko (ekzemple pri la evoluo de la Dumao en Ruslando). Kompreneble estis aperigitaj ankaŭ la kongresparoladoj de Zamenhof, same en la venontaj jaroj. La gazeto havis nur malmultajn paĝojn (ekzemple 4-6).

La jaro 1908 absorbis grandparton de la enhavo pri la fondo de *Universala Esperanto-Asocio* (UEA), kiu estis starigita en aprilo en Ĝenevo. Ĝia unua prezidanto farigis la angla esperantisto **Harold Bolingbroke Mudie**.⁸ Rilate al tiu temo Hodler havis multon por klarigi al la publiko, inter alie en sia dresdena kongresparolado. Krome, la revuo raportis pri la terura tertremo en Italio, kiu kaŭzis pli ol cent mil viktimojn. Per sia 31a numero *Esperanto* fariĝis la oficiala organo de UEA.

Ĝis tiam la revuo aperis en formato 48x34 cm-a, kio ŝanĝiĝis en 1909, kiam ĝi transiris eĉ al 60x44 cm-a formato, du paĝoj estis rezervitaj por komerca reklamo. Ekde oktobro la revuo estis eldo-

¹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Paul_Berthelot.

² Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Charles_Lambert.

³ Vd. http://www.planlingvoj.ch/30_ENCYCL_ESPERANTO_T-U.pdf, p. 21-23.

⁴ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Hector_Hodler; http://www.planlingvoj.ch/19_ENCYCL_ESPERANTO_H.pdf, p. 2-11.

⁵ Vd. http://www.plansprachen.ch/30_ENCYCL_ESPERANTO_T-U.pdf, p. 11-12.

⁶ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Ren%C3%A9_de_Saussure; http://www.planlingvoj.ch/39_ENCYCL_INTERLINGVISTIKO.pdf, p. 25-30.

⁷ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Delegacio_por_alpreno_de_la_lingvo_internacia.

⁸ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Harold_Bolingbroke_Mudie.

nita ĉe la Borsa strato 20 en Ĝenevo,⁹ kie troviĝis la nova oficejo de UEA. En ĉi tiu jaro oni memorigis la 50an jariĝon de la naskiĝo de **L.L. Zamenhof**¹⁰ tiel ke en la unua numero de 1910 aperis preskaŭ tuta omaĝa artikolo de Hodler. Por marki, ke ekzistas kvazaŭ nova lando, la Esperanto-lando (Esperantio), en ĉi tiu jaro Hodler enkondukis la vorton Esperantio kaj aplikis ĝin ekzemple al esperantiaj entreprenoj, esperantiaj kursoj, esperantiaj informoj, esperantia kongreso, esperantia vivo, ktp. Sekve en tiu jaro okazis la Unua Esperantia Kongreso en Aŭgsburgo (kiu samtempe estis deklarita kiel unua kongreso de UEA). La diskuto pri nova statuto forprenis larĝan spacon.

Ĉar evidente la granda formato ne plaĉis al la legantoj, oni transiris al reduktita grandeco de 32x23 cm-oj, do praktike al la A4-formato. Al la enhavo kontribuis krom Hodler kaj lia intima kunlaboranto **Edmond Privat**,¹¹ ankaŭ la franca esperantisto **Théophile Rousseau**¹² per legindaj artikoloj pri diversaj temoj. Estis traktitaj ankaŭ diversaj sociaj problemoj kiel la asekuo pri la senlaboreco, la alkohola problemo en Ruslando aŭ la sklaveco en Usono. Unu el la eldonoj aperigis la kontribuon de Zamenhof al la Internacia Rasa Kongreso, kiu tiujare okazis en Londono. La 7a UK kaj 2a kongreso de UEA okazis tiam en Antverpeno. Ŝajnas, ke la kongreso de UEA ne okazis kongrue kun la UK kaj do estis aparta aranĝo. En tiu periodo aperis ankaŭ diversaj aldonaĵoj de *Esperanto*, kiuj portis la titolojn *Komerca Bulteno*, *La Propagandisto*, *Laborista Bulteno*, *Interŝanĝa Bulteno*. Tiuj eldonaĵoj havis siajn proprajn redaktorojn. Ekde 1912 aperis aparte interesaj artikoloj pri aktuala temo ĉiam enkonduke al la numero. Krom tio oni jam sentis la bezonon komenci skribi pri la ĝisnuna historio de Esperanto kaj publikigis la biografion de L.L. Zamenhof verkitan de li frato Leono. Socia vivo kaj literaturo estis ĉefaj rubrikoj. Analizante la cirkulerojn de la Administra Komitato (prezidata de la franca generalo **Hippolyte Sebert**)¹³ Hodler malkovris tendencojn de plutokratio kaj maldemokratio rilate al financoj kaj kotizaj demandoj. La ofendita Sebert reagis, riproĉante al Hodler, ke li faris malĝustajn kalkulojn kaj eltiris falsajn konkludojn kaj ke li kontraŭbatalas decidojn de la 7a UK kaj instigas aliajn ne akcepti la decidojn. En nova komento Hodler replikis la kritikon. En 1913, jaro de la 9a Universala Kongreso de Esperanto en Berno (Svislando),¹⁴ la revuo traktis la temon pri la moralaj kaŭzoj de la militoj kaj ankaŭ ne ignoris la balkanan krizon, kiu trovis tiam vastan publikan atenton. Ĝuste antaŭ la atenco de Sarajevo *Esperanto* aperigis longan artikolserion sub la titolo „La paco – ĉu vi volas ĝin?” kaj poste la revuo anoncis la parizan Universalan Kongreson. N-ro 172 de la 20a de julio estis la plej lasta eldono la jaro 1914. Pri la Unua mondmilito (kiu tiam estis nomata Granda Milito) *Esperanto* komencis reagi en la unua numero (173) de 1915. En la militajn diskutojn Zamenhof enmiksiĝis per sia „Alvoko al la diplomatoj“: „Post la granda milito“. Por la esperanta publiko eble venis la unua kulmino: Dum 1915-16 Hector Hodler aperigis en *Esperanto* longan serion de propraj artikoloj sub la titolo „Milito kaj homa energio“ kaj „La pacproblemo: Novaj vojoj“. Temis pri retorike elokventa kaj fake kompetenta analizo de la kaŭzoj de la militoj kaj pri proponoj kiel solvi la militan problemon pere de la starigo de nova internacia ordo. Analizante la temaron el la vidpunkto de la humanismo kaj internacia juro, Hodler klopodis pruvi, ke la lingvo kaj movado Esperanto estas intime ligataj kun la pacproblemo. La plej atentokapta momento en tiu milita periodo certe estis la morto de L.L. Zamenhof la 14an de aprilo 1917, pri kiu informis *Esperanto* n-ro 201 de la 5a de majo. Dum la milito pereis ankaŭ aliaj eminentaj samideanoj, tiel ke la Esperanto-movado komencis perdi siajn unuajn apostolojn. Regule la gazeto aperigis legindajn pripacajn artikolojn, kiuj estis verkitaj de diversaj aŭtoroj, tiel ke malgraŭ ĉiaj teruroj kaj malhelpoj la redaktoro de *Esperanto* povis laŭ inteligenta maniero kontribui al la meditado pri milito kaj paco.

En 1919, la plej lasta vivojaro de la fondinto de UEA, Hodler aperigis artikolon pri la furora pariza prelego de Ernest Renan de 1882 pri la difino de la nacio, kaj fakan artikolon pri la formikoj en rilato kun la svisa kuracisto **Auguste Forel**.¹⁵ Kun la svisa esperantisto **Eduard Stettler**¹⁶ li subskri-

⁹ Vd. http://www.planlingvoj.ch/30_ENCICL_ESPERANTO_T-U.pdf, p. 13.

¹⁰ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/L._L._Zamenhof.

¹¹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Edmond_Privat; http://www.planlingvoj.ch/26_ENCICL_ESPERANTO_P.pdf, p. 11-18.

¹² Vd. [https://eo.wikipedia.org/wiki/Théophile_Rousseau](https://eo.wikipedia.org/wiki/Th%C3%A9ophile_Rousseau).

¹³ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Hippolyte_Sebert.

¹⁴ Vd. http://www.planlingvoj.ch/30_ENCICL_ESPERANTO_T-U.pdf, p. 23-24; http://www.planlingvoj.ch/9aUK_Berno1913_Dokumentaro.pdf.

¹⁵ Vd. http://www.planlingvoj.ch/16_ENCICL_ESPERANTO_Fb.pdf, p. 2-6.

bis alvokon de UEA al la esperantistaro, en kiu li admonis la esperantistojn labori realisme kaj en unu-eco por la disvastigo de Esperanto. Inter aliaj artikoloj pri sociaj temoj troviĝis tekstoj pri kapitalo kaj laboro, la okhora labortago, la nuna devo de la intelektuloj, la restonta povo de la ŝtato kaj antaŭrimarkoj pri la fondota Societo de Nacioj. En la serio pri etnaj aferoj aperis klarigoj pri Blankrutenio, tata-roj, ciganoj, armenoj, pri Kartvelio, pri iu hinda religi-sociala movado, k.a. En la literatura parto estis proponita peco de Fjodor Dostojevskij el ‘Memoraĵoj el la Mortejo’. Atentokaptan legaĵon oni trovis per la rakonto de Paŭlo Birjukov, parenco de Lev N. Tolstoj, pri sia vojaĝo tra Ruslando. El nuntempa vidpunkto kurioze estas, ke en aparta rubriko *Espe-ranto* prezentis la nomojn de kvindeko de esperantistoj el Roterdamo, kiuj laboris en plej diversaj profesioj – tramistoj, fervojistoj, oficistoj, komercistoj, arkitektoj ktp. Ekde majo la gazeto (n-ro 225) portis la adreson de Muzea strato 14 en Berno (Svislando),¹⁷ kien UEA provizore translokiĝis. La plej lastfojaĵaj “novjaraj pensoj” de Hodler estis publikigitaj komence de 1920, ĉar en aprilo li forpasis pro tuberkulozo. Lia entombigo en Ĝenevo okazis la 19an de majo. La omaĝo de Edmond Privat, kiu ekde n-ro 238 transprenis la redaktadon de la gazeto, pri Hector Hodler portis la titolon “La venko de Hector Hodler”.¹⁸ Ekde oktobro la gazeta redakcio denove troviĝis en Ĝenevo (Teatra bulvarado 12), kie unuafoje aperis n-ro 242.

Periodo Privat (1920-1934)

Post la bedaŭrata kaj multe tro frua morto de Hector Hodler Edmond Privat en principo daŭrigis la redaktan kurson de sia malaperinta kolego, sed iom ŝanĝis la temajn prioritatojn. Anstataŭ tro da longspiraj artikoloj pri pacismaj, socipolitikaj kaj socialaj temoj kaj aliaj detalaj kaj iom komplikaj fakaj analizoj en stilo flua, sed iom peza, kiujn Hodler ŝatis trakti kaj kiujn li konsideris aparte gravaj, Privat preferis koncizajn enkondukajn tekstojn pri konkreta temo, atribuant grandan atenton al movadaj kaj lingvaj temoj kaj al la evoluo en la Ligo de Nacioj, kie baldaŭ okazos arda diskutado pri Esperanto kaj la internacia lingvo. Do, por ke la esperantista afero rapide progresu, la organiza fundamento, kiun Hodler konstruis, devis esti plenigita per substanco. Tio povis esti nur konkretaj agadoj esperantistaj sine de la ‘ekstera mondo’. Por majstri tiun defian taskon Privat estis la absolute perfekta tipo, ĉar, diferece de la iom seka, malgaja kaj publik-timema Hodler (kaj Zamenhof !), la sangvina kaj kontaktema romando Privat disponis pri vastaj publikaj rilatoj kaj ŝatis aperi en tiuj medioj, kie li elpaŝadis laŭforme elegante, enhave inteligente kaj retorike elokvente. Sed unue redaktoro Privat aperigis alvokon kontraŭ la kontraŭ-esperantista agado de la idistoj. En decembro 1921 Privat skribis en sia kutime kurta editorialo: „Ni do konservu kaj eĉ propagandu niajn ideojn pri socia reorganizo, pri materia rekonstruo, pri tiu aŭ alia scienca teorio, sed ni ne postulu de la esperantismo, ke ĝi solvu ĉion kaj ni ne kreu malamikojn sub la verda standardo. Estu jam granda ĝojo, ke ni povas kunlabori kun tiom multaj bonvolantoj pri unu punkto de la homa progresado, nome la supernacia spirito, nepre necesa al savo de l’mondo. Same kiel la ruĝa kruco aŭ tutmonda helpmovado al malsataj infanoj, la verda stelo de Zamenhof konas nek Francojn, nek Turkojn, nek burĝojn, nek revolucianojn. Nek budhanojn, nek kristanojn, ĝi konas nur *homojn*.“ La ĉi-lastata frazo estis imitaĵo de la konata Zamenhofa eldiro en Bulonjo en 1905. Aliaj integraj temoj estis Esperanto en lernejoj, Japanio, bahaismo, la agado de Esperantista Literatura Asocio.

Sub Privat la vorto Esperantia malaperis favore al Esperantista parolejo ktp. En tempo, kiam la mondo post terura milito retrovis sian pacdinamikon, komencis ludi elstaran rolon plej diversaj internaciaj organizaĵoj. Privat, mem socie, politike kaj ĵurnalisme engaĝata homo, tre interesiĝis pri tiu dimensio de la internacia kunlaboro kaj mem komencis kunorganizati internaciajn konferencojn kiel tiun pri Esperanto en lernejoj. Fakte okazis, ke en Ĝenevo ekinteresiĝis pri Esperanto la elstara svisa pedagogo **Pierre Bovet**,¹⁹ direktoro de la Instituto Jean-Jacques Rousseau. Pri la situacio de Esperanto Privat skribis en 1922 en sia tipe aforismeca stilo: „Ni do ne faru al ni iluziojn, sed klare konsiderante la faktojn, ni laboru metode per sinsekvaj paŝoj. (...) Realismo sola estas malnobla. Idealismo sola es-

¹⁶ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Eduard_Stettler; http://www.planlingvoj.ch/29_ENCICL_ESPERANTO_S.pdf, p. 17-18.

¹⁷ Vd. http://www.plansprachen.ch/30_ENCICL_ESPERANTO_T-U.pdf, p. 13-14.

¹⁸ Vd. ankaŭ http://www.planlingvoj.ch/Hodler_Novajvoj_neu.pdf, http://www.planlingvoj.ch/Ferdinand_Hodler_vivo_kaj_verko.pdf, http://www.planlingvoj.ch/Hector_Hodler_modelo.pdf.

¹⁹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Pierre_Bovet; http://www.plansprachen.ch/12_ENCICL_ESPERANTO_A-B.pdf, p. 33-34.

tas malpraktika. Idealismo devas esti vivmotivo kaj la kaŭzo de sindono, sed realismo devas esti la metodo. Unu devas ordoni, la alia devas plenumi. Idealo nin inspiru, realigo nin okupu.“ Kaj komence de 1923 sekvis el la plumo de la saĝulo jenaj linioj: „Nia movado estas unu el la plej vastaj en la mondo, se oni komparas ĝin kun ĉiuj aliaj. Tamen ĝi ankoraŭ ne sukcesis havigi al si potencan organizon per kotizoj. Ĝiaj fortoj estas tro dissemataj. Se ili kunligiĝus iom discipline kaj eĉ iom komence pri financaj aferoj, Esperanto posedus naciajn kaj internaciajn agilojn, kiuj povus ĵaluzigi la plej konatajn internaciajn movadojn.“ En decembro Privat kutimis rememorigi pri la Zamenhofa tago; krome la specialaj aldonajoj al la revuo *Esperanto*, kiujn Hodler enkondukis, estis daŭrigataj.

Pravigante la mision de UEA, en unu el la numeroj de 1924 Privat atentigis pri la filozofio de Esperanto, citante jenajn erojn el la statuto, kiuj celis la disvastigon kaj uzadon de la internacia help-lingvo Esperanto, plifaciligi la ĉiuspecajn moralajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri raso, nacieco aŭ religio. Krom la kreado de internaciaj servoj, UEA vidis kiel celojn kreskigi intersiaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por fremdaj popoloj. Do, li emfazis la moralan signifon de sia organizaĵo, kiun oni konsideris eĉ pli grava ol la lingvo Esperanto mem. Citaĵoj el samsencaj diroj de **Julia Isbrücker**²⁰ apogis tiun sintenon, al kiu „iam la mondo aliĝos aŭ kiun ĝi imitos“, kompletigate per eroj el la barcelona kongresparolado de Zamenhof (1909), en kiu li montris sin plene konvinkita pri la utileco de UEA. Ĉefaj kunlaborantoj tiam estis **Georges Stroele** (sviso),²¹ **Paul Bennemann**²² kaj **Walter Lippmann**²³ (germanoj), **František Hajek** (ĉeĥo),²⁴ W. Kenn (ĉino), **Petro Stojan** (ruslandano).²⁵ La revuo entenis artikolojn pri Immanuel Kant kaj Lord Byron. En oktobro 1924 *Esperanto* raportis, ke post pluraj kunsidoj pri la internacilingva demando en la Ligo de Nacioj estis akceptita rezolucio, kiu rekomendis Esperanton kiel „praktikan helpan“ kaj „klaran“ lingvon en la telegrafio kaj radio-telegrafio – malgranda rekompensa triumfo post pezaj kaj hontindaj traktadoj en la “Komisiono pri Intelekta kunlaboro”, kie precipe la sviso **Gonzague de Reynold**,²⁶ apogate de la franca registaro, montriĝis kontraŭstaranto de la rezoluciproponoj de Privat kaj decidata kontraŭulo de Esperanto. Krom tio estis anoncita la morto de **Klara Zamenhof**,²⁷ edzino de L.L. Zamenhof, en tiu jaro.

La jaro 1925 estis dominata de la 17a UK en Ĝenevo kun la malfermo de ĝia Kongresa Universitato, pri kiu *Esperanto* detale raportis, kaj Radio Ĝenevo estis fondita. Internacia Radio-Kongreso en Parizo elektis Esperanton kiel lingvon en la radio. Privat emfazis, ke oni bezonas fortan sciencajn asocion kaj viglan komercan movadon: „Ni ĉiam sentis, ke nia lingvo, per sia vivo mem kaj per sia disvastiĝo en la mondo disportas tiun tuthomaran konscion kaj kreskigas ĝin en individuoj eĉ sen aparta preparolo. Ĝi posedas kaj dissemas tiun trezoron, kiu ĝuste mankas al la Ligo de Nacioj, ankoraŭ tro diplomata: la animon interpopolan.“

Pri la financa stato de UEA unuafoje raportis en 1926 Hans Jakob. En Locarno (Tiĉino) okazis labora konferenco, kie Privat ĉeestis kiel prezidanto de la Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado (ICK).

En 1927 **Inazo Nitobe**, japana filozofo-edukisto kaj iama anstataŭanta ĝenerala sekretario de Ligo de Nacioj,²⁸ estis proklamita kiel nova honora membro de UEA, kaj en Prago okazis paceduka kongreso.

En 1928 la germana esperantisto **Hans Jakob**²⁹ fariĝis direktoro de UEA, dum Privat estis ĝia prezidanto. Estis anoncite, ke Esperanto jam atingas la kvaran lokon inter la lingvoj de la internacia vivo, tuj post la angla, franca kaj germana. En preskaŭ ĉiu eldono de *Esperanto* oni trovis raporton pri

²⁰ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Julia_C._Isbrücker.

²¹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Georges_Stroele; http://www.planlingvoj.ch/29_ENCYCL_ESPERANTO_S.pdf, p. 19-20.

²² Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Paul_Bennemann.

²³ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Walter_Lippmann.

²⁴ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/František_Hájek.

²⁵ Vd. Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Petro_Stojan;

²⁶ Vd. https://fr.wikipedia.org/wiki/Gonzague_de_Reynold; http://www.plansprachen.ch/28_ENCYCL_ESPERANTO_R.pdf, p. 9-14.

²⁷ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Klara_Zamenhof.

²⁸ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Nitobe_Inazo.

²⁹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Hans_Jakob; http://www.planlingvoj.ch/20_ENCYCL_ESPERANTO_I-J.pdf, p. 13-16.

iu internacia kongreso, do regis ĝenerala kongresa eŭforio, kaj Privat vidis la mondon demokratiigi. En tiu procezo homoj kiel T.G. Masaryk³⁰ ricevis apartan atenton, kaj Svislando estis prezentita kiel ekzemplo de modela federacio. En la revuo aperis unuafoje detala statistiko kun multegaj ciferoj pri la nombro de esperantistoj kaj ilia divido laŭ lokoj kaj landoj.

Unuaj signoj de realismo, aŭ pesimismo, kaj esprimo de modesteco, fariĝis sentebraj. Sub la titolo ‚Ni vidu la realon’ Privat skribis en la UEA-organo komence de 1929 jenon: „Efektive nia lingvo ankoraŭ ne estas sufiĉe granda potenco en la mondo, ke la registaroj povu ĝin tuj instrui devige en ĉiuj lernejoj. Estis jam granda paŝo, ke ili ĝin permesis, rekomendis aŭ ebligis kaj donis al ĝi internacian oficialan statutecon, ekzemple kiel lingvo akceptebla por telegramoj.“ Privat montris sin konvinkita, ke „se morgaŭ Esperanto fariĝus multe pli forta kaj disvastigata, se ĝin uzus multaj kongresoj, multaj verkistoj, multaj vojaĝantoj, ne havu eĉ dubon, ke la registaroj estus devigataj konsideri ne plu nur permesojn aŭ aprobojn, sed seriozajn gravajn decidojn.“ Anstataŭ lukti por la granda celo, Privat komprenis samtempe, ke „estis ofte la tragedio de nia movado, ke la esperantistoj perdis multe tro da tempo je internaj pli malpli bagatelaj aferoj.“

En la revuo mem la rubriko ‚Socia vivo’ rericivis pli gravan signifon, kaj rimarkinde pli da fotomaterialo interese riĉigis la gazeton.

La gloraj kaj optimismaj 1920aj jaroj pasis, alvenis novaj tempoj, kun sentebla fortiĝo de la ŝtata naciismo – Hitler, Stalin. La demando de la internacia lingvo estis rediskutita fare de eminentaj lingvistoj sine de IALA,³¹ kiu estis sponsorita de riĉuloj el Usono per grandaj monsumoj (kaj kiu naskos en 1951 la novan lingvoprojekton Interlingua). Estis la tempo de la sensaciaj mondvojaĝoj de la svisdevena esperantisto **Joseph R. Scherer**,³² kun grandformataj bildoj pri li en la revuo de UEA. En internaciaj konferencoj la angla lingvo evidentiĝis pli kaj pli kiel malagrabra konkurento de Esperanto. Privat reagis al tiu problemo per aparta editorialo, apogante la kritikon de la malfacila prononco de la angla lingvo en radio, kiu „kaŭzis la rimarkindan nesukceson de la angla lingvo sur la parolata radiokampo, dum ĝi plene venkis la skriban radio-telegrafion. Male lingvoj kiel itala aŭ esperanta, kun malmultaj vokalsonoj kaj plimulto de plursilabaj vortoj montriĝis despli klare aŭdeblaj.“ Kaj: „La angla lingvo de la skandinavo kaj germanoj sonas kvazaŭ ĉina misteraĵo al la latinaj oreloj kaj verŝajne reciproke.“ (...) Ankaŭ en posta numero Privat reaktis la ‚anglan demandon’, ĉi-foje aplikite al la situacio en Azio, konstatante kontraŭdiron inter parola kaj skriba uzado kaj ke la elparolo de la angla estas malfacila por azianoj. Hipoteze estis aldonita la frazo: „Neatendita kunligo de demokrateco kaj fonetiko baras la vojon al plena superrego de la angla lingvo kaj akcelas la progreson de la neŭtrala Esperanto por kontentigi urĝan bezonon.“ Vidante tiun ĉi frazon, kelkaj legantoj supozeble sulkgigis la frunton kaj konsideris ĝian aŭtoron naiva. Fakte Privat kombinis du flankojn de la menso: la idealisman-optimisman-naivan kaj la realisman-klarvidan.

Pri la homaranismo Privat klarigis, ke Zamenhof ne fondis novan religion kun apartaj dogmoj kaj eklezio. Li nur proponis al homoj de diversaj kredoj respekti la kredojn de la aliaj kaj serĉi tion, kio unuigas ĉiujn. La celo de Zamenhof estis krei „komunan etikan kadron kaj regularon“, sed li mortis antaŭ ol li povis realigi ĝin. Tio ne estis fondo de nova religio, sed profundigo kaj altigo de ĉies etiko al tuthomara amikeco. La libro *Interpopola konduto* de Privat, kiu aperis en la 30aj jaroj en la franca, angla kaj en Esperanto, estis verkita sub la influo de la zamenhofa humanismo kun provo apliki ĝin al la internaciaj rilatoj.³³

Privat kredis, ke Esperanto povos servi al la kulturo: „Dum Esperanto malmulte utilas en hoteloj ĝis nun, la kampo, kie ĝi vere vivas kaj servas al kelkmiloj da homoj en ĉiuj landoj, tio estas ĝuste kulturo.“

En aŭtuno Privat aperigis artikolon sub la titolo ‚Unueco en diverseco’ por trakti la internacian emon de la homaro al unueco: „Estas jam utile kaj bone interesiĝi je ceteraj nacioj kaj ilin ekami, sed tio ne sufiĉas. Kion la mondo bezonas urĝe, tio estas ne nur ekkonscio pri la unueco de la homaro, sed

³⁰ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Tomáš_Garrigue_Masaryk.

³¹ Vd. <https://eo.wikipedia.org/wiki/IALA>.

³² Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Joseph_R._Scherer; http://www.plansprachen.ch/29_ENCICL_ESPERANTO_S.pdf, p. 2.

³³ Vd. http://www.plansprachen.ch/20_ENCICL_ESPERANTO_I-J.pdf, p. 11-12.

tiel fortan konsciencen tiurilatan, ke ni kapablu ĝin memori eĉ kiam la bezonoj de l'aliaj popoloj kontraŭstaras la blindajn interesojn de nia ŝtato.“

Koncerne la progresojn en la Ligo de Nacioj Privat evidente fariĝis pli kaj pli pesimisma. Konstatante, ke ankaŭ Ligo de Nacioj ne helpos venki la naciismon de la ŝtatoj kaj ke daŭre regas perforto en la mondo, li skribis: „Se la homarodecidus rezigni je tiu oble miljara rimedo, tio estus revolucio pli grava ol ĉiuj aliaj sociaj aŭ politikaj okazintaĵoj de la historio.“ Kaj li iomete mokis pri iu (nenomita) sinjoro, kiu venis al Ĝenevo aŭskulti la „bonegajn paroladojn“ aŭdigitajn angle kaj france kaj konkludis, ke la problemo pri helpa mondlingvo ŝajne jam ne estas aktuala. Per alia ekzemplo Privat celis montri, ke la publikigita financa raporto en januaro 1932 montris, ke UEA havas kreskantajn ŝuldojn kaj jaran perdon.

La Asocio estis klare minacata de krizo, ne nur financa. Kiel montris la multaj raportoj en *Esperanto* pri la viglaj agadoj de UEA, la aktivecoj kreskadis. Krome, la neŭtralisma movado perdis multe de sia iama elano, kaj la landaj societoj alkroĉiĝis al certagrada naciismo, kiu tiam estis moda. Ankaŭ la Internacia Centra Komitato (ICK), kiu estis prezidata de Privat, ne sukcesis unuigi la divers-tendencajn organizojn. Kiam la Ligo de Nacioj montris, ke ĝi fajfas pri internacia helplingvo, la seniluziigo flanke de la esperantistoj estis grandega. Lige kun la demando pri reorganizado de la movado aperis en novembro 1932 la propono fondi Universalan Federacion Esperantistan (UFE). Privat vigle malrekomendis tiun projekton, kiu evidente venis de Eduard Stettler kaj René Dubois, kaj kiu celis la likvidon de UEA far la naciaj societoj, kiuj transprenu ĝian laboron. Kiel strikta malamiko de superfluaj kvereloj Privat avertis, ke en tia batalo la esperantistaro perdis multe da tempo sen ia profito por la movado. La teksto de la projekto estis paralele aperigita kun la statuto de UEA. Por substreki la gravecon de la ekzisto de UEA estis publikigitaj tekstoj de Hodler kaj Zamenhof, kiuj konfirmis la socian signifon kaj la taŭgecon de UEA.

Nu, en 1933, la jaro de la 25a jubileo de UEA, Privat povis anonci, ke la asocio retrovis la unuecon en kompromiso. La “Plano de Ĝenevo” estis subskribita de Stettler, Schoofs, Goldsmith, Dubois, Kreuz kaj Steiner. Laŭ la “Interkonsento de Kolonjo”,³⁴ kiu en sia originalo estis publikigita en *Esperanto*, UEA fariĝis la centra tutmonda organizo de la movado, al kiu la naciaj societoj povis aliĝi kun sia tuta membraro per kontraktoj.

La jaro estis tikla: Post la transpreno de la povo far Adolf Hitler aperis malklareco en Esperanto-medioj, ĉu estus bone okazigi la UKn en Kolonjo. *Esperanto* publikigis malferman leteron de Stettler al la kolonja LKK kun aludoj pri la kontraŭjuda politiko. Sed li ne volis enmiksiĝi en la internajn aferojn de la germanoj, por kies malfacila situacio li havis certagradan komprenon, kvankam certa skeptiko pri tiu kongreso tamen restis. Li eĉ sugestis prokrasti ĝin, se ne eblus malfortigi la negativajn informojn pri Germanio en la gazetaro. Sed nuligo de la kongreso en Kolonjo estis konsiderata kiel ofendo de la germanaj kolegoj. Do, la kongreso tamen okazis kun ,nur’ 950 partoprenantoj. La nacisocialisma ĉefurbestro aperis vestita en bruna ĉemizo, kaj lia parolado, en kiu la lingvo Esperanto ne estis menciita (!), estis aplaudita kaj konfirmita per levado de la brakoj. Poste la germano **Robert Kreuz**³⁵ plene laŭdis la kongreson kaj Hans Jakob skribis pri la neceso de la adapto de la germana Esperanto-asocio al la reala politiko. Ĉar la Esperanto-movado estas neŭtrala, necesus ricevi la apogon de registaroj, dum la opinio de individuaj esperantistoj en tio ne tro gravus, laŭ lia opinio.

Alia grava publikigo estis nova Financa Raporto, kiu konfirmis la monperdon de antaŭaj jaroj.

Kiam en 1934 la asocio translokiĝis al la domo en la strato Tour de l’Ile 1 en Ĝenevo,³⁶ iom ŝanĝiĝis ankaŭ la ekstera aspekto de *Esperanto*. Hans Jakob lamentis pri malbonaj tempoj, sed difinis la rolon de UEA jene: „Senpolitikeco, supernacieco, sinlimigo. Tio signifas, ke la nova UEA estas politike, religie, rase absolute neŭtrala. (...) Nek estas loko en UEA por politikaj diskutaĵoj, religiaj harfendaĵoj, konsideroj pri rasa supereco, nek por entreprenoj naskitaj el ideo de surtera Edeno, realigebla per tutmonda lingvo. Sed UEA defendas ĉion, kiu celas pli bonan sinkomprenon [inter diversgentaj homoj].

³⁴ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Interkonsento_de_Kolonjo.

³⁵ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Robert_Kreuz.

³⁶ Vd. http://www.plansprachen.ch/30_ENCYCL_ESPERANTO_T-U.pdf, p. 14-15.

Leono Zamenhof, frato de la aŭtoro de Esperanto, mortis en februaro 1934 kaj ricevis en la marta numero detalan nekrologon kun foto.³⁷

La revuo donis larĝan spacon al la prezentado pri landoj, kie okazis kongresoj kaj konferencoj. En junio aperis detala raporto pri la estrarkunsido de Kolonjo, kie oni diskutis ĉefe teknikajn, financajn kaj formalajn aferojn. Jam delonge flarante ion malbonan en la aero, Privat alvenis nur por la tagordero „revuo”. Li kritikis, ke oni perdas tempon kaj alvokis, ke oni konservu la pacon kaj la konkordon en la asocio. La germano **Teo Jung**³⁸ volis kunigi sian *Heroldon de Esperanto* kun la revuo *Esperanto* de UEA. La prezidanto tiam estis Stettler, la franca generalo **Louis Bastien**³⁹ apartenis al la provizora estraro. Ĉeestis ankaŭ Hans Jakob kaj Robert Kreuz.

En 1934 Privat ankoraŭ salutis la ĉeestantojn de la 26a UK en Stokholmo⁴⁰ per radio (lia salutmesaĝo estis publikigita en *Esperanto*), sed kun aliaj (**Andreo Cseh**⁴¹ kaj **J.W. Karsch**⁴²) per nur kvar ricevitaj voĉoj ne plu estis reelektita en la komitato de UEA. Stettler rezignis pri la prezidanteco, ĉar li malkonsentis pri „kelkaj gravaj punktoj“. Kun Jakob li eĉ proteste forlasis la salonon. Elektita kiel nova prezidanto estis la anglo **John Merchant**,⁴³ kaj kiam tiu rifuzis, pretis transpreni la taskon Bastien. Eblas paroli pri malgranda puĉo. La kvereloj eksplodis, ĉar laŭ Bastien la asocio troviĝis rande de la (financa) abismo. Ke necesas unue ekvilibrigi la financojn, anoncis Bastien en la postkongresa eldono de *Esperanto*, sur kies frontpaĝo jam mankis la nomo de Privat. Kvazaŭ en piednoto Bastien formale dankis al sia antaŭulo pro la farita laboro. La resumo de la protokolo estis publikigita. La reorganizado de la asocio estis de nun prizorgata de la Centra Oficejo sub la respondeco de la Direktoro de UEA, Robert Kreuz. En oktobro Bastien provis klarigi kio okazis kaj kontraŭstaris la opinion de iuj, kiuj vidis UEA-n fariĝi viktimo de la „naciismo“. Pere de zamenhofaj citaĵoj Bastien celis substreki, ke la Esperanto-movado kaj UEA estas malfermaj al ĉiuj – kaj al tiuj, kiuj kredis je la “interna ideo”, kaj al tiuj, kiuj vidis en Esperanto nur interkomunikilon. Depost la enoficiĝo de la nova komitato de UEA, la CO estis komplete reorganizita.

Kiam aperis redaktora vakuo, en 1935 Robert Kreuz prenis la respondecon pri la gazeto. Anstataŭ iuj enkondukaj artikoloj aperis sur la titolpaĝoj de 1935 bildoj de eŭropaj kaj ekstereŭropaj urboj kiel Napolo, Tripolo, Malto, San Marino, Liĥtenŝtejno, Luksemburgo, Vieno, Seviljo, Novjorko, Osako, Lugano, k.a. Ideologiaj kaj strategiaj temoj reduktiĝis favore al la raportado pri praktikaj celoj de Esperanto, ekzemple akceptiĝo pere de rezolucio aŭ kiel varbi maristojn aŭ enkonduki Esperanton en junularajn gastejojn.

Robert Kreuz subite forpasis en januaro 1936.

Sed pli granda ŝoko sekvis en marto, kiam estis anoncita la translokado de la CO de Ĝenevo al Londono. El 21 ricevitaj respondoj de komitatoj nur 4 volis resti en Ĝenevo, 17 akceptis la proponon forlasi Ĝenevon, de kiuj 11 preferis Londonon. 6 Vienon. La pravigo por tiu paŝo estis la altaj elspezoj en Ĝenevo kaj la pli malaltaj kostoj en Britio, ke en Londono jam troviĝas multaj internaciaj organizaĵoj kaj ke Brita Esperanto-Asocio estis unu el la plej fortaj landaj asocioj. Bastien konfesis: „La penso, ke ni forlasu Ĝenevon, kiu de multaj jaroj fariĝis por la esperantistoj kvazaŭ simbolo, ĉagrenis min tiel, ke ĝis nun mi ne kuraĝis esplori la aferon.“ Provizora redaktoro de *Esperanto* fariĝis **Michael Wittenberg** (M. Movo).⁴⁴ La nova direktoro de la CO, la anglo **Cecil C. Goldsmith**,⁴⁵ lamentis en ju-lio 1936: „Jam de du jaroj ni perdis per internaj disputoj multon el la forto kiun ni povus havi.“

Per cirkulero Bastien diskonigis la 18an de septembro, ke oni fondis eĉ novan asocion: **Internacian Esperanto-Ligon (IEL)**. En novembro *Esperanto*, kiun daŭre eldonadis Jakob en Ĝenevo, publikigis la juĝon de la Respubliko kaj Kantono de Ĝenevo, kiu nuligis la decidon de UEA

³⁷ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Leono_Zamenhof.

³⁸ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Teodor_Jung.

³⁹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Louis_Bastien.

⁴⁰ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/UK_1934.

⁴¹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Andreo_Cseh.

⁴² Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Johannes_Waldemar_Karsch.

⁴³ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/John_Merchant, <http://esperanto.net/literaturo/autor/merchant.html>.

⁴⁴ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Michael_Wittenberg.

⁴⁵ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Cecil_Charles_Goldsmith.

pri transportado de la sidejo al eksterlando kaj kondamnis UEA-n je pago de 163.80 frankoj. La tuta afero estis longe komentita flanke de **K.M. Liniger**, prezidanto de UEA,⁴⁶ kaj **Renaud Richez**, vicprezidanto.⁴⁷

Dum IEL kun nova periodaĵo nomata *Esperanto Internacia* kaj redaktata de Teo Jung en Scheveningen troviĝis en Britio kaj al kiu grandparto de la Esperanto-movado aliĝis, UEA kun sia tradicia gazeteto *Esperanto* restis kun Jakob kaj la ceteraj svisoj, kiuj procesis kontraŭ Bastien, en Ĝenevo. Intertempe la dua mondmilito eksplodis. En 1940 Jakob trovis lokon en Palais Wilson, kie li modeste daŭrigis la agadon de UEA kaj la eldonadon de *Esperanto*, kiu ĉefe raportadis pri la dumilita helpo al la familio Zamenhof. Stettler mortis en oktobro 1940, la nekrologon skribis **Hans Kürsteiner**.⁴⁸ Kiam dum la UEA-IEL-skismo (1936-47) ekvakis la posteno de la prezidanto de la malnova UEA, tiu svisa esperantisto akceptis ĝin en 1941 post longa hezitado kaj restis en tiu ofico ĝis 1947. Dum la dua mondmilito li organizis kun Hans Jakob kaj la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco (IKRK) la helpkaj serĉadoservon por esperantistoj. Tiel oni povis apogi la zamenhofan familion plu vivi en la varsovia geto. Kürsteiner admonis la esperantistojn ne adapti sin laŭ unu el la regantaj mondkonceptoj, ĉu faŝisma, ĉu bolŝevisma. Liston de pereintaj esperantistoj dum la dua mondmilito (1939-45) aperigis *Esperanto* en septembro-oktobro 1946.⁴⁹ En tiu milita kaj skisma periodo la malnova *Esperanto* sukcesis aperi laŭ numeroj 481 ĝis 498.

Periodo Jakob (1936-1956)

Dum la movada skismo (aŭ disdubiĝo, disdueco) *Esperanto* estis daŭrigata per n-ro 499 de Hans Jakob, kiu povis anonci diversajn novaĵojn. Ĉar en Varsovio en 1937 ne ankoraŭ eblis kunigi ambaŭ asociojn kaj ĉar sekvis la milito, la kuniĝo de IEL kaj UEA povis efektiviĝi nur en 1947 pere de la “Akordo de Berno”, Hans Jakob ĝoje komentis la situacion per jenaj vortoj: „Per la nuna numero de *Esperanto* komenciĝas nova fazo en la Esperanto-movado kaj ni deziru, ke ni daŭrigu la vojon de evolucio, ne sekvante plu la emon je revolucio. Malfido, manko de celkonscio, ĵaluzo, financa haoso kaj fine la minacanta milito, ĉio tio ĵetis siajn ombrojn sur nian aferon.“ Jakob promesis, ke li pluredaktos la gazeton laŭ la spirito de Hodler (kaj ne de Privat!). Per la slogano „For la pesimismon!” Jakob alvokis al pli da optimismo. Ĉar en 1947 estis la 60a datreveno de la ekpublikigo de *Esperanto*, Jakob envicigis Zamenhofon en la vicon de Mozeo, Kristo kaj Spinoza kaj finis sian artikolon per „Majstro, gvidu nin!”

Per la kunfandiĝo de ambaŭ asocioj adiaŭis Bastien kaj Kürsteiner, dum la svedo **Ernfrid Malmgren**⁵⁰ iĝis nova prezidanto de UEA kaj Goldsmith ĝenerala sekretario.

Nun komenciĝis ankaŭ la tempo de „nia verva, vigla, volforta d-ro **Ivo Lapenna**“⁵¹ esperantisto de 1928, ekde 1937 komitatano por Jugoslavio kaj ekde 1938 ano de la estraro de IEL. Lia kario en UEA fakte komenciĝis per malsukceso. Kiam dum la berna UK en 1947 kiel estrarano de UEA, apogate precipe de orienteŭropaj Esperanto-organizaĵoj, li proponis rezolucion, kiu celis kondamni la naziistajn kaj faŝistajn krimojn, la komitato preferis la neŭtralecon kaj rifuzis la proponon per klaraj 126 voĉoj (por 40, sindetenoj 34).⁵²

Ĉar tuj post la dua mondmilito komenciĝis la “Malvarma Milito”, Jakob ne hezitis de tempo al tempo komenti tiun novan tragedion inter Oriento kaj Okcidento, ekzemple: „Ĉi tiu konflikto, naskiĝinta el reciproka malfido, influas ĉion. Ĝi ne estas la diplomata ludaĉo, sed oratora interbatalo de du ideoj laŭvide ne kunigeblaj.“ „Nian pozicion“ Jakob karakterizis tiel: „La ne-politika (legu neŭtrala) movado de Esperanto, internacie reprezentata de UEA kaj nacie de la Landaj Asocioj, havas nur unu celon Nomojn. Ĉi tiu celo estas, ke nia lingvo estu akceptata ĉie kaj de ĉiuj.“ Reference al la “Dekla-

⁴⁶ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Karl_Max_Liniger.

⁴⁷ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Renaud_Richez.

⁴⁸ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Hans_Hermann_Kürsteiner; http://www.planlingvoj.ch/22_ENCICL_ESPERANTO_K.pdf, p. 15.

⁴⁹ de pereintaj esperantistoj en Pollando vd. sub http://www.planlsprachen.ch/Esperanto_Polen.pdf, p. 77-79.

⁵⁰ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Ernfrid_Malmgren.

⁵¹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Ivo_Lapenna; http://www.planlingvoj.ch/Rezension_Lapenna.pdf.

⁵² La eldonoj de *Esperanto* inter 1905 kaj 1946 estas konsulteblaj rete sub <https://www.onb.ac.at/bibliothek/sammlungen/plansprachen/digitale-medien/periodika>.

racio de Bulonjo”,⁵³ Jakob memorigis, ke „ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia Esperantisto ligas kun la Esperantismo, estas la afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas.“

Alia konflikto komenciĝis – inter Jakob kaj Lapenna – kiam en decembro 1947 la redaktoro de *Esperanto* fridtone reagis al sufiĉe drasta kritiko de Lapenna en *Internacia Kulturo* (Sofio) pri plej diversaj flankoj de la berna kongreso. Pro manko de spaco Jakob rifuzis represi la artikolon de Lapenna en *Esperanto*. La kritikon de Lapenna Jakob rifuzis kiel „konatan kanton kontraŭ okcidentaj landoj“. Plue: „Ni opinias ĉi tiun imitadon de politikaj konversacioj inter oriento kaj okcidento superflua en nia movado. Ni estas societo, ne ŝtato. Ni dependas de la bonvolo de ĉiuklasaj homoj, kiuj venas pro diversaj motivoj al Esperanto. Ni vidas antaŭ ĉio la homon, lia religio kaj lia politika kredo aŭ opinio ne koncernas la Asocion, krom se ĝi kontraŭas la statuton de UEA, kiu klare deklaras la elementajn homrajtojn kiel unuan kondiĉon de sia laboro. Tio signifas, ke ni ne akceptas ekzemple Nazi-faŝistojn en UEA. Ĉi tiun devojiĝon de la diskutado en pure politikan sferon ni simple bedaŭras. La propono de la rezolucio en Bern jam estis mispaŝo. Ĉi tiu vojo kondukas al nova skismo, pli danĝera ol la pasinta. Ekzistas nun diversaj opinioj pri demokratio kaj demokrata procedo. (...) Se juristo Lapenna deziras apliki la efektivan demokration svisan, en kiu ĉiu grava decido de la registaro estas submetadata al la popola voĉdonado, tiam li devos trovi rimedon per kiu voĉdonantaj membroj portu ankaŭ la materian respondecon. La nuna statuto de UEA respondas al faritaj spertoj. De 1910 oni senĉese diskutadis, ŝanĝis statutojn, revenis al estintaj formoj ktp. Ĉi tiu ludado neniel progresigis nian movadon. Por eksterulo ĉi tiu diskutado pri formo de demokratio ŝajnas ridinda.“ Jakob, kiu subskribis interkrampe per „svisa demokrato“, notis, ke cetere en la tuta kritiko de Lapenna li trovis nur unu pozitivan frazon. La malamikeco inter Jakob kaj Lapenna estis supozeble perfekta kaj revenos kiel bumerango al Jakob, kiam Lapenna ludos la ĉefan rolon en UEA.

La „svisa demokrato“ Jakob, kiu origine estis germano, ne estis lasita indiferenta de la sorto de sia patrujo. „La germanan problemon“ li traktis en *Esperanto* ne nur unufoje. Krome, lin interesis la lingva situacio post la milito, kies evoluon li klare pritaksis. Laŭ Jakob el la iamaj konkurentaj lingvoj, kiuj en „tiu ĉi batalo de lingva imperialismo“ „batalis inter si pri la rolo de *internacia* peradlingvo en Eŭropo“ – la angla, franca kaj germana restis du kaj la rusa ne ludas rolon. „Hodiaŭ la demando pri internacia lingvo havas alian aspekton. Por Esperanto la situacio fariĝis tia en multaj landoj, ke ĝi devas preskaŭ esti en opozicio al la angla. La roloj de ambaŭ lingvoj estas nete malsamaj. La angla estas mondlingvo, dum Esperanto volas esti helplingvo, nenio alia!“ La lernado de la angla (kiel de ĉiu nacia) lingvo ne ĝenas nin, Ni nur kontraŭas la ideon, ke nacia idiomo povus esti la internacia HELPLINGVO, tie kie la naciaj idiomoj ne sufiĉas. Paradoksa estas nun la situacio, ke ni devas deziri, ke aliaj grandaj lingvoj anoncu sian rajton esti rekonita[j]“ en internaciaj rilatoj. Ju pli da tiaj aspirantoj sin anoncas, des pli ni rajtas atendi, ke oni iam re-ekzamenos la demandon pri sinteza lingvo, kiu ne pretendas ian hegemonion. La naciismo en lingva sfero iam kunhelpas al la efektiviĝo de la sole eb-la solvo: La adopto de Esperanto kiel internacia lingvo!“

En aprilo 1948, 40a datreveno de la starigo de UEA, Jakob klarigis, ke la fondo de UEA okazis en kunsido inter H. Hodler kaj Th. Rousseau en la franca urbo Bourg-en-Bresse, departemento Ain, Francio, pli precize en hotelo Terminus. Tre modesta estis ĉi tiu fondiĝfesto. Kiel cefajn portantojn de la ideo Jakob menciis Privat, Mudie kaj poste Stettler.

Malgraŭ ĉiaj packonsideroj de la lingvo Esperanto, Jakob skribis en unu el siaj editoriaĵoj de tiu jaro, ke „ni tamen ne povas partopreni en la batalado por la sekurigo de la paco, problemo vasta kaj komplika.“ Kaj en oktobro li denove admonis, ke ni restu ekster la kvereloj inter la registaroj de oriento kaj okcidento. En alia artikolo Jakob alvokis al subteno de la federisma ideo kaj al unueco, kiam aperis propono („de konata verkisto“) modifi la ortografion. Prezidanto Malmgren limigis siajn kontribuojn al novjaraj salutmesaĝoj. Ekzemple li skribis: „Ni esperantistoj devas konfesi, ke ni per nia propra forto ne havos grandan ŝancon konkeri la mondon en antaŭvidebla tempo. Sed se ni povus ligi al ni aliajn gravajn organizaĵojn, tiuj helpus nin venki.“ En tiu senco li alvokis forlasi la izoladon: „Ni serĉu la malamikon aŭ indiferentan publikon en ĝia kaĝo, t.e. en la diversaj ne-esperantistaj asocioj.“ En marto 1949 Jakob analizis la diversajn formojn de la tradicia malamikeco kontraŭ la internacia lingvo. En la rubriko „Esperantismaj problemoj“ Jakob traktis tutan aron da demandoj, kiuj

⁵³ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Deklaracio_pri_Esperanto.

koncernis la internan kaj eksteran agadon de UEA. Inter alie li kritikis la sektismon tipan por movado kiel la esperantista.

Sed kun tiuj internaciaj organizaĵoj nenio iris glate. En la aprila numero aperis protesto de UEA kontraŭ eldiro de la ĝenerala direktoro de Unesco, d-ro Torres Bodet, kiu ŝajne diris ion en la senco kontraŭa al la internacia lingvo, kvankam Unesco promesis, ke ĝi rilatas neŭtrale al la demando.

Nu, por antaŭenpuŝadi la aferon de Esperanto la destino ŝajne elektis ĝuste Ivo Lapenna, kiu en 1949 forlasis Jugoslavion kaj unue migris al Francio por iri poste al Britio (kaj fariĝi brita civitano). Kiel komisiito de UEA pri prelegvojaĝoj Lapenna veturis tra pluraj landoj (Francio, Islando, Britio, Italio, Belgio, Nederlando) kaj elpaŝis publike en tuta aro da urboj. Raportoj pri liaj vojaĝoj estis publikigitaj en *Esperanto*.

Baldaŭ Lapenna dominadis la enhavon de la gazeto kaj parolis klartekston. Konkludoj de liaj vojaĝoj tra la Esperanto-movado de tiuj landoj estis ligataj kun drasta negativa kritiko: Li renkontis „troan individuismon, mankon de memdisciplino kaj organiziteco, mankon de veraj, funkciaj sociaj, mankon de fortoj kaj mankon de aktivaj propagandaj centroj, mankon de profunde ellaborata laborplano, ktp.“ Kiel apostolo de la Afero li tamen konkludis, ke „la homaro bezonas la Internacian Lingvon. Hodiaŭ pli multe ol iam.“ Kaj: „Se ni volas eliri el la nuna ensorĉita cirklo“, ni devas radikale ŝanĝi la aferojn. (En piednoto la redaktoro de *Esperanto* rimarkigis, ke Lapenna kutime uzas ĉe landnomoj la finaĵon -io kaj ke por kongrui la uzon kun la ĝenerala praktiko oni ŝanĝis tion al -ujo).

Ekde n-ro 542/1951 la koncepto de la revuo *Esperanto* draste ŝanĝiĝis. Post enketo inter la legantoj oni decidis ŝanĝi la formaton de la gazeto al la populara formato de la Digest-kajeroj, kiun „multaj opiniis pli moderna kaj pli taŭga“. „La uzebla spaco estos pli granda, la kajeroj estos pli dikaj, aspektos pli imponaj antaŭ la eksterstarantoj, la disponebla loko estos pli facile dividebla.“ Por pli racie uzi la spacon redaktoro Jakob aldonis la admonon: „Mallongigu viajn tekstojn, uzu ekonomie la adjektivojn (nia *bela* lingvo, nia *glora* afero, nia *sankta* idealo, ĉio tio foje bone sonas, sed ripete ĝi enuas kiel modkuranta kanto!), rakontu koncize faktojn!“ Jakob anoncis, ke li daŭre sekvos la linion de Hodler.

Unuafoje estis publikigita la festparolado de Ivo Lapenna, kiun li faris en la 35a UK en Parizo. En siaj paroladoj Lapenna ne ŝparis patoson, kiu kelkfoje eĉ superis tiun de Zamenhof: „La ideo pri Internacia Lingvo estas esprimo de universalismaj tendencoj. La realigo de tiu ideo en formo de nia Esperanto estas la plej konkreta, preskaŭ fizike palpebla manifestiĝo de tiu celado de tuthomeco. Sed samtempe ĝi estas ankaŭ la plej forta apogilo, la plej potenca antaŭeniganto de tiu sama universalismo, kiu ĝin kreis.“ ktp. La seka Jakobo supozeble devis esti strange tuŝata de tiaj troigoj, sed li ne komentis ilin. Lapenna torentis denove sur la paĝoj de *Esperanto*, eksplikante, ke la stato de nia propagando estas nekontentiga. Al la laŭtaj krioj kaj fanfaronaj sukcesoj de la prelegvojaĝoj de Lapenna kvietaj artikolo de **Juan Régulo Pérez**⁵⁴ pri la Kanariaj Insuloj estis bonvena kontrasto. Kiel ekvilibro al la primovadaj enhavoj servis ankaŭ tekstoj pri bretona ceramiko, kanada lando, savado de infanoj, eksperimenta telepatio, bremenaj urbmuzikantoj, maorioj, pralingvo homara, skota lingvo aŭ literatura peco de Selma Lagerlöf. **Tibor Sekelj**⁵⁵ verkis pri montgrimpado en Suda Ameriko, kaj sub la pseŭdonimo Georges Agricola Jakob publikigis fakajn artikolojn. Privirina rubriko estis enkondukita. Sur la paĝoj de Esperanto estis prezentita gravaj kunlaborantoj de UEA, ekzemple ĉefdelegitoj en unuopaj landoj.

Dum la estraro de UEA timis novan mondmiliton, en 1952 Lapenna fondis la “Centron de Esploro kaj Dokumentado” (CED) kaj kuraĝe publikigis en *Esperanto* la nefermitan leteron al Stalin kun la fama kritiko de la sovetia lingva imperiismo kaj kontraŭesperanta politiko, kiu estis subskribita de la estraroj de UEA kaj SAT.⁵⁶ Oni konstatis, ke en Sovetunio kaj orienta Eŭropo Esperanto malaperis favore al la rusa lingvo, kiu tie estas devige instruata. En 1952 UEA havis entute 14'943 membrojn en 83 landoj. Tiu cifero tamen falis de 18'749 en 1949. Lapenna fanfaronis, ke CED havas 68 kunlaborantojn en 16 landoj. Unu el siaj fakaj artikoloj li dediĉis al la genocido kiel nova kategorio de la internacia krimo.

⁵⁴ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Juan_Régulo_Pérez.

⁵⁵ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Tibor_Sekelj.

⁵⁶ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Sennacieca_Asocio_Tutmonda.

Fine de la jaro Jakob konkludis: „La Esperanto-movado kiel tutaĵo estas hodiaŭ grava socia elemento. Pro sia universaleco ĝi ne estas periferia t.e. vivante kaj agante ĉe la rando de la socio. Ĝi ne estas sekto apartiĝanta aŭ sin enfermantanta aŭ izoliganta de la cetera mondo. Pro la penado por interpopola kompreno ĝi fariĝis eminenta faktoro en la socia vivo ne plu malatentebla.“

En 1953 paralelis agado ĉe Unesko kaj la preparado de la UK en Zagrebo, Jugoslavio. Oni fanfaronis, ke verŝajne neniam antaŭe en la historio de la UK ŝtato kaj urbo tiel pozitive deklaris sian favoron al la kongreso. Efektive: Mason Stuttard, la Konstanta Kongresa Sekretario (KKS) de UEA, estis akceptita de Vladimir Bakarić, prezidanto de la kroata registaro, kaj de marŝalo Josip Broz Tito mem. Do, la publika flatado al Jugoslavio kaj al **Josip Broz Tito** kiel „esperantisto“⁵⁷ en *Esperanto* ne estis pretervidebla. Radio Zagrebo enkondukis Esperanto-elsendojn kaj Slovenia Esperanto-Asocio aperigis la libron „Jugoslavio kaj ĝiaj popoloj“.

Ĉar Lapenna devis silenti pri la jugoslavia kongreso, li trovis alian temon por kritiki: la literaturon: „Ambaŭ problemoj – la kvalito kaj la kvanto – havas la saman ĉefan fonton – ne sufiĉan interesigon de la Esperant-lingva publiko por la propra literaturo ĝenerale kaj absolute nekontentigan apogon al la elstaraj verkoj speciale.“ Tamen, Lapenna konstatis almenaŭ pliboniĝon de „nia informado“.

Pri la zagreba kongreso aperis nur laŭdoj: Jakob notis, ke „la kongreso mem pasis en bonega etoso“, kaj oni konstatis „veran intereson ĉe la regantaj rondoj por nia celo.“ Edmond Privat paroladis kaj menciis, ke li vizitis Zagrebon jam en 1915 kaj 1936.

Esperanto opiniis inde raporti ankaŭ pri la SAT-kongreso, kiu okazis en Sheffield, Britio. Okaze de la centjara datreveno de la naskiĝo de Ferdinand Hodler, patro de Hector, Esperanto publikigis en marto tre interesajn personajn memorojn de Hans Jakob pri la pentristo.

En 1954 Jakob aperigis la historion de la financado de UEA. Konkludo: „Ĉiu idealisma movado, sen flanka gajno el komercaj servoj, sen registara subteno, devas kalkuli kun la oferemo de la membroj.“

Longan sociologian analizon trovis la legantoj el la plumo de iu E.D. Durrant. En tiuj jaroj aperis artikoloj de konataj esperantistoj kiel **Tibor Sekelj**, **Paul Neergard**,⁵⁸ **Carl Støp-Bowitz**,⁵⁹ **Ferenc Szilágyi**,⁶⁰ **Gaston Waringhien**,⁶¹ **Arthur Baur**,⁶² **Marinko Givoje**,⁶³ **Reto Rossetti**.⁶⁴

En la ĝenerala konferenco de Unesko en Montevideo (Urugvajo) en 1954 komenciĝis la kampanjo koncerne la petskribon/rezolucion rilate al Esperanto per elpaŝo de Lapenna kun parolado. Dum la tuta jaro oni malmulte legis pri tio en *Esperanto*, krom ke en Montevideo okazis ekspozicio pri Esperanto. Ralph Harry, ĝenerala konsulo de Aŭstralio kaj Novzelando, delegito de la eŭropa sidejo de UN en Ĝenevo, publike elpaŝis en Palaco de Nacioj. En novembro la gazeto aperigis iom surprize la Bulonjan Deklaracion.

La 30an de julio mortis **Wanda Zamenhof**, edzino de Adamo Zamenhof (filo de L.L. Zamenhof),⁶⁵ pro stratakcidento en Parizo. Post la UK en Haarlem (Nederlando) oni jam komencis informi pri la sekvonta UK en Bologna (Italio).

Sed la bombo sekvis komence de 1955. La neatendita pozitiva novaĵo pri la akceptita montevidea Esperanto-rezolucio okupis la gazeton dum la venontaj monatoj. Dana delegito preskaŭ fuŝis la aferon, kiun savis meksikanoj post protestaj intervenoj de la Urugvaja Esperanto-Societo, kiu disvas-

⁵⁷ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Josip_Broz_Tito. Por certaj jugoslaviaj esperantistoj kaj simpatiantoj de Tito tiu fama komunisma politika gvidanto estis speco de kvazaŭ-sanktulo, kvankam en lia nomo estis plenumitaj krudaj lezoj kaj krimoj kontraŭ la homaro kaj domo en Jugoslavio kaj sub kies reĝimo politikaj opoziciuloj estis kruelce persekutataj, laŭ bone konata stalinisma maniero (vd. http://www.planlingvoj.ch/Tito_Jugoslavio.pdf).

⁵⁸ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Paul_Neergard.

⁵⁹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Carl_Støp-Bowitz.

⁶⁰ Vd. [https://eo.wikipedia.org/wiki/Ferenc_Szilágyi_\(verkisto\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Ferenc_Szilágyi_(verkisto)).

⁶¹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Gaston_Waringhien.

⁶² Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Arthur_Baur, http://www.plansprachen.ch/12_ENCYCL_ESPERANTO_A-B.pdf, p. 7-8.

⁶³ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Marinko_Givoje.

⁶⁴ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Reto_Mario_Rossetti, p. 17-18.

⁶⁵ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Wanda_Zamenhof.

tigis komunikojn tra la landa gazetaro. La akcepto de la UNESKO-rezolucio n-ro IV.4.422 pri Esperanto de la 10a de decembro 1954⁶⁶ estis laŭdata kiel „laboro herakla“ de Lapenna. La “venko de Montevideo” do estis la ĉefa temo de tiu jaro, kaj prezidanto Malmgren alvokis la esperantistaron „eluzi la venkon, ĉar se ni ignoras tion, ni vane ekagis“. En aparta artikolo Lapenna, kiu mem estis festata kiel „heroo de Montevideo“, detale klarigis la signifon de la unika decido en Montevideo. UEA ricevis la konsultan statuson, kio signifis inter alie, ke UEA rajtis sen speciala invito sendi observanton al ĉiu sesio de la ĝenerala konferenco. Reto Rossetti verkis specialan poemon pri Lapenna. Sen mencii la nomon de la heroo, Jakob emfazis, ke la rezolucio de Unesko signas „komencon de nova epoko en nia movado“. La meritojn por tiu sukceso Jakob vidis unuavice ĉe la „sindona klopodado de miloj da idealistoj“, kaj li postulis la enkondukon kaj ĝeneraligon de Esperanto kiel unu el la urgaj taskoj, kun la helpo de Azio kaj Afriko.

Nu, kun la jaro 1955 alvenis ankaŭ la fino por Jakob. Festante lian 50an jubileon kiel esperantisto kaj 20an kiel redaktoro de *Esperanto*, Kürsteiner dankis lin pro la farita laboro. La julia numero n-ro 596/7 estis la plej lasta, kiun li redaktis. Kun lia nomumo kiel honora redaktoro la redaktado transiris al la literaturisto **William Auld**⁶⁷ el Skotlando. En novembro la Centra Oficejo translokiĝis de Britio al Roterdamo, Eendrachtsweg 8, Nederlando. Alia novaĵo estis, ke la estraro decidis, ke Lapenna fariĝu ĝenerala sekretario de la asocio.

Periodo Auld / Zacho (1955-1962)

La novan jaron Malmgren enkondukis kiel „novan epokon“ por la asocio en la organo, kiu sub la nova redaktoro William Auld radikale ŝanĝis sian aspekton kaj koncepton. Unuafoje koloraj kovriloj estis enkondukitaj. Literaturo ricevis pli da atento por pruvi, ke ĝi estas la plej grava atuto de la movado. Auld notis: la literaturo „konsternas niajn malamikojn, ĝi impresas la indiferentulojn.“ Estis ankaŭ la tempo de la Belartaj Konkursoj⁶⁸ kaj de *la nica literatura revuo*.⁶⁹ En la nova koncepto la kontribuoj de Lapenna reduktiĝis al la necesa minimumo, tiel ke oni povis eviti plifortiĝon de persona kulto ĉirkaŭ la heroo de Montevideo. Tamen, la vortoj kaj opinioj de la nova ĝenerala sekretario daŭre pezis. Sub la titolo ‚La danĝeroj de sukcesoj‘ Lapenna skribis: „Kio estas tre malbona kaj eĉ danĝera por la plua disvastiĝo de la lingvo kaj por la interesoj de la movado, estas la konvinko aŭ almenaŭ la agrabla kredo, kiu enradikiĝis en kelkaj esperantistaj medioj (ne sensignifaj laŭ la nombro), ke finiĝis la tempo de sindona batalado kaj ekestis la periodo de kolektado de fruktoj, sen ia speciala streĉo de fortoj, sen laboro, sen oferoj. En la malpli gravaj kazoj de tia malsano oni kredas kaj kredigas aliajn, ke UEA sola povas atingi ĉion. Ĉe tio oni kutimas identigi la Asocion kun ĝiaj nuraj gvidaj instancoj, aŭ kun kelkaj personoj aŭ eĉ kun unuopuloj. (...) Miloj da laborhoroj kaj granda kvanto da energio estas neracie perdataj kaj multaj gravaj atingoj restas sen iaj ajn pluaj sekvoj.“ Lapenna komparis tiun situacion kun la ĝardenisto, kiu post granda laboro vidis sian ĝardenon ordigita, sed subite laca sidiĝis rigardante la fruktojn faladi kaj putriĝi antaŭ si.

Alia inovacio estis la enkonduko de la junulara rubriko ‚La Juna vivo‘, kiu respegulis la kreskantan agadon de la esperantista junularo, kiu ariĝis ĉirkaŭ TEJO kaj kiu, fondita en 1938, fariĝis en 1956 junulara sekcio de UEA.⁷⁰

Kvankam la fanfaronado de Lapenna ĝenerale estis senteble reduktita, li proklamis en 1956 la venkon de Esperanto super la aliaj projektoj de komuna lingvo kaj klarigis la kialojn. En la jaro de la hungara ribelo kontraŭ stalinisma subpremo estis aperigita en la revuo la helpalvoko de la aŭstra ĉefdelegito por kolekti monon por la hungaraj rifuĝintoj. En UK Marseille 1957 povis alveni poloj kaj bulgaroj, sed ne hungaroj. Nova KKS estis la italo **Gian Carlo Fighiera**.⁷¹ Redaktoro Auld vidis la kulturan nivelon de niaj aranĝoj ĉiujare altiĝi, kaj en la ĝenerala eŭforio li skribis, ke en estonteco devos esti ankoraŭ pli granda nombro da individuaj membroj de UEA kaj pli da esenca apogo al plej

⁶⁶ Vd. [https://eo.wikipedia.org/wiki/Unesko#Rezolucio_de_1954_\(Montevideo\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Unesko#Rezolucio_de_1954_(Montevideo)).

⁶⁷ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/William_Auld.

⁶⁸ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Belartaj_Konkursoj_de_UEA.

⁶⁹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Nica_Literatura_Revuo, <http://literaturo.org/HARLOW-Don/Esperanto/Literaturo/Revuoj/nlr>.

⁷⁰ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Tutmonda_Esperantista_Junulara_Organizo.

⁷¹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Gian_Carlo_Fighiera.

diversaj agadoj. Bezonataj estus pli da kunlaborantoj kaj pli da rimedoj. Fiere *Esperanto* menciis la Konsultan Statuson sur sia titolpaĝo. Okaze de la tago de la homaj rajtoj estis aperigita artikolo pri tiu temo, kaj Edmond Privat reanoncis sin per kontribuado pri Zamenhof kaj Tolstoj kaj memoroj pri Paul Birjukov⁷² kaj Anna Ŝarapova, kiuj vivis apud Ĝenevo. Fine de 1957 UEA nombris 27'093 membrojn, kio signifis novan rekordon. Sed la dezirata celo estis 50'000 membroj kun 100'000 apogantoj. Aldoniĝis raporto pri „nova etapo“ de la ĉina Esperanto-movado. En aprilo aperis jubilea numero omaĝe al la fondo de UEA antaŭ 50 jaroj kun kontribuadoj de Lapenna, Privat, Jakob, Malmgren. Poste estis omaĝita ankaŭ la 30-jara jubileo de Lapenna kiel esperantisto kaj 20-jara kiel estrarano de UEA per artikolo pri „Ivo Lapenna – vivo kaj laboro“.

En 1959 estis vaste celebrata la 100-jara datreveno de la naskiĝo de L.L. Zamenhof,⁷³ la UK okazis en la kulturpalaco de Varsovio, kiu estis konstruita inter 1952 kaj 195 kiel „donaco“ de Sovetunio aŭ Stalin persone.⁷⁴ En „grava“ prelego de Fighiera, kiu estis publikigita en *Esperanto*, la personeco de Zamenhof estis jene karakterizita; „Idealisto estis Zamenhof kaj samtempe malpasia aganto, kiu neniam sekvis sian instinkton aŭ emociion, sed nur obeis al sia logika inteligenteco.“ „Tiu lia fera logika inteligenteco pli ol unu fojon savis Esperanton de la perejo, al kiu gvidus ĝin la fanatikuloj.“ Tial „la Esperanto-movado bezonas altan kulturalan nivelon; ĉar esperantismo kiel lingvo-movado havas esence kulturalan karakteron. Altigante la kulturalan nivelon de la Movado, ni kreas la kondiĉojn, en kiuj ni regajnas al niaj celoj la simpation de la intelektularo. Sen ili Esperanto ne havas esperon venki sian batalon.“ (Zamenhof kaj la movado, majo 1959). Pri la longa prisilentado de lia juda deveno: „Ni rajtas fieri, ke Zamenhof apartenas al tiu malfeliĉa gento, kiun jarcentoj humiligis kaj senlimaj turmentoj silente nobligis.“ La decembra numero estis speciala eldono kun multaj interesaj kontribuadoj pri Zamenhof verkitaj de eminentaj esperantistoj. Ankaŭ Privat, kiu fariĝis 70-jara, ricevis honoran omaĝon. Lapenna konstatis progreson de la monda informado pri Esperanto (kiel sekvo de la diskutoj pri informado kaj propagando en Frostavallen en 1957), kaj la financoj de UEA finis la jaron 1958 sen defecito. Do, pri la evoluo de UEA kaj de la Esperanto-movado en la 50aj jaroj oni povis esti en principo tute kontenta kaj Lapenna, aŭtoro de la libro *Retoriko*,⁷⁵ bilancis ĝin ankaŭ pozitive. Unesko honoris la nomon de Zamenhof kaj eldonis specialan numeron de *Unesko Kuriero*. Eldoniĝis Stelo-moneroj kun la dato de 1959.

La redaktoreco de Auld ne estis longdaŭra. Pro lia malsaniĝo la numerojn 634 ĝis 661 aperintajn inter septembro 1958 kaj decembro 1960 transprenis s-ino **Kirsten Zacho** (la posta neoficiala bopatrino de Ivo Lapenna)⁷⁶ en komenca kunlaboro kun H.V. Rasmussen en Danio, poste sen li. Sed en januaro 1961 Auld revenis kiel redaktoro por transpreni la respondecon por la numeroj ĝis novembro 1962.

En 1960 estis enkondukita nova grafika koncepto de *Esperanto*. En tiu ĉi jaro la revuo raportis pri la plej diversaj solenaĵoj lige kun la pasinta Zamenhof-jaro. Ĉar formiĝis grupoj en Hindio, Pakistano, Israelo, Japanio, Koreio, Vjetnamio, Ganao kaj aliloke ekster Eŭropo, ekzistis kialo por proklami la finon de la eŭropa epoko de la Esperanto-movado.

En la festparolado de la 45a UK en Bruselo Lapenna difinis sian „humanecan internaciismon“, nomis Esperanton internaciisma lingvo, kio estus ligata kun nova respondeco por la Esperanto-movado: „La hodiaŭa mondo ne plu havas multajn vojojn antaŭ si por elekti. Ekzistas nur du vojoj. Unu fatala kondukas al plena detruigo, al malapero, la alia kondukas al plia prospero en frateco, egaleco kaj libereco. Ni, la ordinaraj, la simplaj homoj deziras iri laŭ tiu dua vojo. Ju pli baldaŭ kaj ju pli rapide, des pli bone. Kaj en tiu irado ni esperantistoj, organizataj en ĉiam pli fortaj organizaĵoj, devas fariĝi la avangardo, tiu taĉmento, kiu venkas la obstaklojn por ke la aliaj povu progresi pli facile. Rompante la lingvajn barojn kaj kreante samtempe sentojn tuthomajn kaj pensmanieron mondan, ni detruas la ĉefan obstaklon al la venko de humanisma internaciismo, kiu sola povas ne nur savi la homaron, sed ankaŭ doni al ĝi en la plej baldaŭa estonteco vivigojn kaj feliĉon neniam spertitajn ĝis nun.“

⁷² Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Paul_Birukoff.

⁷³ Memolibron pri la Zamenhof-jaro de tiu jaro vd. sub <http://www.ivolapenna.org/verkoj/books/memorlibro.pdf>.

⁷⁴ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Varsovia_Kultur-_kaj_Sciencpalaco.

⁷⁵ Vd. http://www.ivolapenna.org/verkoj/books/esp_retoriko.pdf.

⁷⁶ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Kirsten_Zacho.

Hioban mesaĝon *Esperanto* devis disanonci, kiam en oktobro 1960 subite mortis **Giorgio Canuto**, kiu ĝis tiu jaro estis la prezidanto de UEA.⁷⁷ La titolpaĝo de la revuo portis lian bildon kaj Lapenna verkis la nekrologon. Poste stariĝis la Fondaĵo Canuto por helpi al membroj en t.n. nepagipovaj landoj (termino integre uzata en la kotiza sistemo de UEA).

En 1961 aperis pompa statistiko pri la situacio de Esperanto en la lernejoj, kampanjo, kiu estis komencita antaŭ nelonge. Auld verkis artikolon pri Esperanto kiel literatura lingvo, Waringhien fariĝis 60-jara. En 1962 estis festata la 10a datreveno de la fondo de CED. La februara numero portis la bildon de la mara junulino en Kopenhago, kie tiujare okazis la 47a UK. En marto *Esperanto* publikigis la unuan parton de la dua baza laborplano de UEA. Aperis artikoloj pri la neŭtraleco de Esperanto kaj pri la evoluo de la esperanta poezio ligite kun pledo por la Esperanto-literaturo. La kovrilo de la septembra eldono portis tutpaĝan foton de Lapenna. La japano **Hideo Yagi** fariĝis nova prezidanto de UEA,⁷⁸ la sviso Edmond Privat forpasis en la aĝo de 73 jaroj. Atenton kaptis la raporto pri la karavano tra Afriko, gvidita de Tibor Sekelj. En 1962 okazis ankaŭ la translokiĝo de UEA al nova domo situanta ĉe la adreso *Nieuwe Binnenweg* 176 en Rotter-damo.

Periodo Sadler (1962-1974)

La 38a-jara Auld forlasis la postenon de la redaktoro kun „miksitaĵ sentoj“. Unu kialo por lia demisio estis, ke la komunikado inter Skotlando kaj Nederlando, kie troviĝis la presejo, ne montriĝis „tro oportuna“. La malrapida funkciado de la poŝto malfruigis la aperon de la gazeto. Krom tio Auld iom laciĝis, ĉar temis pri laboro farenda ekster la profesia okupiteco. Kaj nelaste li estis ankaŭ redaktoro de alia revuo, kiu nomiĝis *Monda Kulturo*. Modesta karaktero, Auld petis pardonon pro mankoj kaj pekoj. Unuafoje la transdono de la redaktora torĉo pasis en digna maniero.

La redaktan laboron transprenis **Victor Sadler**,⁷⁹ naskita kiel brito en 1937, doktoriĝinta lingvisto-fonetikisto. Lin Auld nomis „mia bona amiko“, la kunlaborado kun Lapenna estis karakterizita kiel „amikeca“.

Sadler, kiu kolektis spertojn kiel esperantisto en Cejlono, interesiĝis pri azia agado kaj sekve atribuis pli da atento al tiu mondoparto. Sur tiu kampo li eĉ montriĝis fakulo. Al liaj unuaj paŝoj apartenis la prezento de ambicia projekto pri azi-afrika strategio, kiun li taksis „politike malfacilega kaj nur en daŭro de pluraj jardekoj efektivebla“. Sed li montris sin kaj realisma kaj skeptika: „Eĉ se la registaroj tion volus, tamen la popoloj ne akceptus lerni plian lingvon nur por internaciaj rilatoj. En okcidento Esperanto ankoraŭ ne atingis rimarkindajn sukcesojn, eble ĉar por okcidentaj landoj la lingva problemo estas ĝena, sed ne urĝega. En Afrazio aliflanke, ekzistas en la eduka sfero efektiva bezono, por kiu ĝis nun troviĝis neniu vere kontentiga solvo.“ Do, al Afrazio necesus pruvi peresperantan solvon. Krom pri Azio kaj Afriko la 25-jaraĝa Sadler esperis je la junularo, kiu „alportas novan energion, novan optimismon, novajn ideojn.“ Sadler konkludis, ke „ni devas objektivite konstati, ke ĉiuj ideoj ĝis nun provitaj ne donis la sukceson esperitan.“ Plia bezonata faktoro estus „kvalito, kiun la vivo ĉiam pli gravigas“. Li admonis, ke en la hodiaŭa mondo oni devas esti bone informita kaj adaptiĝema, se oni volus okupi gravan pozicion, ĉar intertempe aperis tuta aro da fakularo, kiu okupiĝas pri la lingva problemo, do la esperantistoj ne estas la solaj. Ŝajnas, ke li mem dubis, „ĉu nia movado adaptiĝis adekvate al la 7a jardeko de la 20a jarcento“.

Ĉu tiu kritiko plaĉis al Lapenna kaj ĉu ĝi estis farita kongrue kun lia propra pritakso de la aferoj, estas malfacile diri. Certe, Sadler aŭdigis novan tonon en la publika diskutado de la problemoj, kio ne nepre kontribuis al la „sankta harmonio“ de la esperantistaro, kiu ja ankaŭ tute konas internajn kverelojn, sed kiu ĝenerale preferas trankvilon kaj optimismon en la diskutoj.

En tiu tempo la nomo de **Humphrey Tonkin**⁸⁰ komencis aperi en la revuo *Esperanto*, kie li debutis per artikolo pri Shakespeare kaj pri lingvoj en Afriko. En tiu serio estonte aperos tuta artikolaro pri plej diversaj lingvoj, kio respegulis la personan intereson de la redaktoro, kiu estis lingvisto.

⁷⁷ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Giorgio_Canuto.

⁷⁸ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Yagi_Hideo.

⁷⁹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Victor_Sadler.

⁸⁰ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Humphrey_Tonkin.

La membrostatistiko montris 32'460 anojn en 85 landoj. Pli kaj pli da orienteŭropaj voĉoj de esperantistoj el socialismaj landoj aperis en la laboro de UEA kaj volis esti konsiderataj, precipe polaj, hungaraj kaj bulgaraj. Pri la enormaj problemoj de la ŝtata agnosko de la ekzisto de la Esperanto-movado en Germana Demokratia Respubliko (GDR), kie la zamenhofa lingvo komence ne estis dezirata en la Germana Kulturligo, la legantoj de *Esperanto* eksciis nenion, ĉar pri tiu temo neniu raportis el GDR mem, kiu per sia Berlina Muro, kiu estis strikta tabuo en Oriento, estis hermetike fermata de la Okcidento.

Fone de tiu kreskanta membronombro, Sadler ne nur mem kritikis, sed disponigis la revuon ankaŭ al aliaj kritikantoj, da kiuj estis ne malmultaj, ĉar multaj amasiĝintaj demandoj kaj problemoj de organizo, kies taskaro evidentiĝis pli kaj pli ampleksa kaj defia kaj kies pozicio en la ĉirkaŭaĵo socia kaj politika ĉiam pli malfacila, restis nesolvataj. Ekzemple **E.L.M. Wensing**,⁸¹ vicprezidanto de UEA, konstatis „paradokson inter niaj klopodoj rapide disvastigi nian movadon kaj la ‚inerta amaso‘, kiu ‚devas esti pulsigita‘. Krome: ‚Nia movado bezonas pli da batalantoj, ĝisfunde instruataj, bone dokumentataj, universale orientataj, kiuj pretas obstine lukti kaj batali, defendante nian komunan aferon kaj konvinkante la mondon pri la ĝusteco morala kaj praktika de nia celado.‘ Do, videble ĝis nun aperis tuta bukedo da ambiciaj taskoj kaj celoj, kiuj ŝajnis por tia organizaĵo kiel UEA tro defia: literaturo, junularo, Unesko, Esperanto en lernejoj, membrokresko en pli kaj pli da landoj, tutmondiĝo, ktp. ktp. Vole-nevole konfliktoj pri organizaj kaj strategiaj demandoj devis aperi – tra la ventilo de la revuo *Esperanto*. En novembro 1963 aperis sur la paĝoj de *Esperanto* la teksto de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj. En orienta Eŭropo iuj supozeble ne tro ŝatis vidi tiun dokumenton, aliaj ja certe (kaŝe) ĝojis.⁸²

En februaro 1964 Lapenna publike pensis pri universaleco kaj demokrateco de UEA. Por efike disvastigi iun ajn ideon necesus havi je dispono ‚taŭgan organizan aparaton‘, li konkludis.

En tiu ĉi jaro forpasis Emilie Hodler, la vidvino de Hector Hodler. Sen tiu nekrologo en *Esperanto* oni verŝajne ne estus eksciinta la sorton de tiu virino, kiu neniam estis aktiva esperantistino, sed kiu apogis kun simpatio la verkon de la fondinto de UEA kaj kiu postlasis al UEA sufiĉe altan sumon (kiu grandparte elvaporigis dum la financa krizo de la 30aj jaroj).

En januaro 1964 Lapenna menciis kelkajn kaŭzojn de la nekontentiga progresado de la Esperanto-movado. Nu, ĝia tasko ne devus esti ŝanĝi la mondon. Li plendis, ke la demokrateco ‚estas en niaj organizaĵoj multfoje plene deformita‘, ĉar oni preferus la rajtojn kaj forgesus la devojn. Gvidaj unuopuloj en la movado neus la devigan karakteron de la Statuto kaj Regularoj de UEA. Ne eblus altiĝi la membronombro, se ne kreskas la nombroj en la bazaj ĉeloj; ne eblus plibonigi la informadon, se oni ignoras la ‚Principaron de Frostavallen‘⁸³; ĝenus amaso da nenecesaj sinturnoj pro bagatelaĵoj al la centraj organoj de la Asocio, kio sufokis la laboron; oni ne utiligis la taŭgan informan materialon eldonitan de UEA kaj CED; nekompetentuloj enmiksiĝas en bone funkciajn servojn kaj malobservas la proprajn taskojn; longaj diskutoj pri malgravaj aferoj kaj perdo de imagoj pri perspektivoj kaj proporcioj malhelpas la agadon, same kiel konstanta restarigado de la samaj demandoj jam multfoje solvitaj. Krome mankas organiza disciplino kaj individua memdisciplino; energio kaj tempo superflue perdiĝas kaj estas neracie malŝparitaj; la Unesko-rezolucio kaj aro de gravaj sciencaj konferencoj restas neekspluatitaj; financaj rimedoj de UEA estas terure malgrandaj. Plej forte Lapenna bedaŭris, ke la esprimo ‚diktatoro‘ estas aplikita ‚al niaj plej sukcesaj aktivuloj‘ kaj ke maljustaj kampanjoj kontraŭ mondkonataj aktivuloj kaŭzis, ke tiuj ‚altvaloraj pozitivaj elementoj‘ forlasis niajn vicajn. Movado, kiu vundas siajn plej bonajn kaj kapablajn membrojn, fakte detruas sin mem. Nur personoj plene konsciaj pri la grandeco de la afero kaj havantaj intelektan kuraĝon povas tion elteni. Ke tiaj ne abundas, ne estas surprize. Konkretaj nomoj kaj kazoj mankis en tiu ‚analizo‘. En la somera eldono Lapenna komentis la reagojn al lia listo de plendoj kaj mem pravigis sian tiucelan elpaŝon, konfirmante, ke preskaŭ ĉiuj reagoj apogis lian sintenon. Parton de la Esperanta gazetararo li kondamnis, direktante al ĝi la riproĉon, ke ili praktikus nur misinformadon: ‚La misprezentoj detruas la fidon en la koroj de miloj

⁸¹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/E.L.M._Wensing.

⁸² La Esperanto-movado, kiu klare simpatiis kun la komunismo, neniam raportis pri la lezado de la homaj rajtoj en la mondo. La sola Esperanto-organizaĵo, kiu atentigis pri la lezadoj de la homaj rajtoj en la mondo, estis la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL), kiu eldonis la revuon *Etnismo*.

⁸³ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Principaro_de_Frostavallen.

da ordinaraj sinceraj batalantoj ĉie tra la mondo, disvastigante defetismon kaj ŝanceligante eĉ la plej fortajn karakterojn.“ Kaj li alvokis: „Intertempe ĉiu faru sian eblon por fortikigi la multnombrajn pozitivajn flankojn de nia gazetaro kaj por forigi kiel eble plej multe la negativajn trajtojn.“ Ne temus pri manko de pozitivaj fortoj, sed temus pri „la troa pezo de la negativaj elementoj“. Kvankam tiu nekutima publika skoldo de la ‚heroo de Montevideo‘ sendube estis necesa, ĝi kreis malagrablan etoson, sed supozeble fortigis ankaŭ la indiferentecon.

En februaro 1964 la grafika aspekto de la revuo ŝanĝiĝis. La titolo ricevis tiun aspekton, al kiu la generacioj al kutimiĝis ĝis en la 80ajn jarojn.

Sadler ne limigis sin nur je la aperigo de diskuttemoj el la propraj fontoj, sed transprenis materialojn ankaŭ el aliaj esperantaj periodaĵoj, ekzemple el *Heroldo de Esperanto* en aprilo 1964. Tie Gian Carlo Fighiera, edzo de la pola redaktorino **Ada Sikorska**,⁸⁴ listigis plurajn plendojn kontraŭ UEA. Ekzemple ke la kotizoj de UEA estas iom altaj, kio malhelpus la malsuprajn tavolojn aliĝi al la asocio kaj bremsus ĝian laŭnombran kreskon. Due, ke post la salajroj kaj aliaj elspezoj restas „preskaŭ nenio por la propagando de Esperanto“. Tra tiu artikolo la publiko eksciis ankaŭ pri la jura proceso kontraŭ Hans Jakob en Ĝenevo, ĉar tiu vendis asociajn valorpapirojn sen aprobo kaj scio de la estraro. Ĉi tia pro-ceso estus „evitinda kaj evitebla“ laŭ Fighiera, kiu malantaŭ ĝi supozis „malnovan personan konflik-ton“. Krome, la organiza sistemo de la Universalaj Kongresoj ŝajnis al Fighiera „en kelkaj rilatoj malpli taŭga ol la antaŭa kaj ke ĝi entenas gravajn kontraŭdirajn principojn kaj organizajn erarojn kaj danĝerajn tendencojn“. Ĉe la financoj li vidis stagnadon. La estraro malagrabla reagis al tiu elpaŝo de Fighiera kun la admono, ke *Heroldo* malrespektas rezolucion, kiun la estraro akceptis kaj kiu „kondamnas maljustajn atakojn ofendajn kaj insultajn kontraŭ elstaraj personoj de la movado kaj precipe kontraŭ la ĝenerala sekretario“ (kiu estis Lapenna).

En junio UEA devis priplori la perdon de sia prezidanto Hideo Yagi, kiu forpasis la antaŭan monaton. En septembro estis diskonigite, ke Lapenna fariĝis nova prezidanto de UEA, kio estas logika paŝo post 26 jaroj da membreco en la estraro. La novembra titolpaĝo montris la fumantan Lapenna-n grandformate.

Kiel nova prezidanto de UEA Lapenna dismesaĝis, ke estas grave nombre fortikigi la asocion kaj plene sukcesigi la “Jaron de la Internacia Kunlaborado”, kiu staris antaŭ la pordo.

Erik Carlén⁸⁵ konsilis „altigi nian lingvonivelon“, ĉar alta lingva nivelo de la esperantistoj estus necesa ne nur por konvinki la homojn pri la valoro de Esperanto. Ĝi estas necesa ankaŭ por la vivo de la lingvo mem. Laŭ li, homoj kun malalta lingva nivelo ne nur malbone konas la lingvajn tradiciojn, sed ankaŭ havas malbonan lingvan senton. Por plibonigi tiun flankon de la kompetenteco estis rekomendite legi literaturon en Esperanto kaj bedaŭrate estis, ke la esperantistoj tro malmulte legas en sia „bela, nuancrica lingvo“. Ĉu hazarde aŭ ne, la apero de verkoj en *Esperanto* kiel la tradukoj de la finna epopeo ‚Kalevala‘,⁸⁶ ‚Leĝo Lear‘ de Ŝekspiro kaj ‚Kaŭkazaj rakontoj‘ de Lermontov celis stimuli la legemon de la legopigraj esperantistoj. Poste Carlén ankaŭ skribis en *Esperanto*, ke la movado bezonas iun ideologion, ĉar ankaŭ aliaj popolmovadoj havas „relative simplan ideologion kun tre alta nivelo.“ Li konsciigis, ke pro la falo de la ideologia nivelo ankaŭ aliaj movadoj komencis stagni, ĉar ili ne plu havis la potencon stimuli homojn al laboro kaj diversaj aferoj kaj ke la entuziasmo definitive malaperis. Pri kiuj konkretaj movadoj aŭ ideologiaj sistemoj la skribinto pensis, li ne menciis.

La sektemajn tendencojn en la Esperanto-movado Carlén komentis laŭ sekvanta maniero: „Vere estas, ke precipe dum jardekoj pasintaj ekzistis kaj ankoraŭ ekzistas sektecakaj, troidealistaj esperantistoj, kiuj troigas la ideojn de Zamenhof kaj prezentas ilin en ofte stranga kaj ridinda maniero. Por ili Esperanto fariĝis kvazaŭ religio (...). Ofte per siaj vestoj, konduto kaj sinteno ili aperas kiel veraj stranguloj. Sendube tiaj esperantistoj en sia troa kaj stranga samideaneco malutilas al la movado. Oni povas kompreni, ke multaj prudentaj esperantistoj reagis kontraŭ tia misprezento de Esperanto fare de tiuj stranguloj. Sed ofte ili reagis en maniero, kiu ankoraŭ pli multe povas malutili al la movado ol povas fari fanatikaj stranguloj.“ Carlén rekomendis, ke la altaj idealoj de la internacia amikeco estu

⁸⁴ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Ada_Fighiera-Sikorska.

⁸⁵ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Erik_Carlén.

⁸⁶ Vd. <https://eo.wikipedia.org/wiki/Kalevala>.

vivtenataj, sed „en bona kaj prudenta maniero“. Ankaŭ en tiu artikolo mankis konkretaj kazoj kaj nomoj.

Maurice Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, sugestis revizii la delegitan reton.⁸⁷ Nome li malkovris la paradokson, ke en tempo kiam oni volas stimuli la uzon de Esperanto en la internaciaj rilatoj de la popoloj, inter la 3000 delegitoj kaj 168 fakoj de UEA ekzistas nur kelkaj malmultaj delegitoj pri edukado kaj instruado. Jaumotte alvokis al pli „faka“ pensado.

La sekvanta bato venis flanke de Sadler mem, kiu en 1966 konstatis, ke „la tutmonda informado pri la Internacia Lingvo, malgraŭ la granda stimulado, kiun donis al ĝi la Jaro de la Internacia Kunlaborado, multe postrestas kompare kun la aliaj ĉefaj branĉoj de la agado.“ „Eĉ en tiuj kazoj, kie la ĝisnuna agado estas ĝenerale utila kaj pozitiva, la informantoj ofte similas al surdaj oratoroj, kiuj daŭre ripetas la samajn argumentojn, en la sama formo, neniom sciante pri la kritikoj kaj kontraŭargumentoj, kiuj aŭdiĝas el la publiko. Sed ĝuste tiuj kritikoj, tiuj reagoj de la publiko estas la ŝlosilo por daŭra plibonigo de la informado.“ „Tro ofte persono, kiu renkontis malsukceson en siaj klopodoj diskonigi Esperanton, sen plua esploro konkludas, ke la publiko estas apatia aŭ la medio estas malfavora, dum la malsukceso povus ŝuldiĝi al lia propra sinteno, eble tro truda aŭ tro humila. En tia kazo oni eksperimente adoptu alian sintenon kaj komparu la rezultojn.“

En februaro 1966 *Esperanto* raportis pri artikolo en *Amerika Esperantisto*, kie oni observis kreskantan influon de la komunistaj landoj en la administrado de UEA, kun mencio de konkretaj ekzemploj. En la sekva numero Sadler replikis, ke UEA estas laŭstatute neŭtrala organizo kaj atentigis, ke en la historio Esperanto ofte estis uzata por politikaj celoj, ĉar iuj propagandistoj opiniis, ke Esperanto bone taŭgas por la propagando.

Ĝuste pro politikaj kialoj, la UK de la jaro 1967 devis esti nuligita en Tel-Avivo (Israelo) kaj okazigita en Rotterdamo.

Okaze de la 60-jariĝo H.W. Holmes analizis la fandan tempon de UEA. Pri la „Jaro de Homaj Rajtoj“ *Esperanto* skribis: „En la speciala plano de agado, kiun starigis al si CED okaze de la Jaro de Homaj Rajtoj esploroj pri malobservoj de la lingvaj rajtoj okupas gravan lokon. Antaŭjuĝoj, diskriminacio kaj rektaj persekutoj bazataj sur lingvaj diferencoj, lingva imperiismo kaj ŝovinismo, kultura genocido – ĉiuj ricevas apartan atenton.“ UEA kaptis la okazon por lanĉi „kampanjon kontraŭ lingva diskriminacio“. Lapenna, kiu vidis la lingvan problemon akriĝi, transdonis al la sekretariato de UN la amase apogitan proponon por radikala solvo de la lingva problemo. Per tio oni esperis, ke iu ajn ŝtato povas postuli, ke la afero estu metita sur la tagordon. La propono estis nek rifuzita, nek akceptita. Alia artikolo traktis la „lingvan diskriminacion“ en la Internacia Olimpika Komitato. Kvarpersona delegacio de UEA protestis en konferenco de neregistaraj organizaĵoj pri Homaj Rajtoj en Parizo kontraŭ lingva diskriminacio.

Ĉu hazarde aŭ ne, en 1968, la jaro de la sovetia agreso kontraŭ Ĉeĥoslovakio, sur la paĝoj de *Esperanto* aperis la komenco de studo (de Sadler) pri la persekutoj de esperantistoj sub Hitler kaj Stalin, sed ankaŭ en Hispanio, Francio kaj la sovetia zono de Germanio. La teksto estis publikigita sub la aŭspicio de CED. Tiuj studoj kondukos poste al la libro ‚La Danĝera Lingvo‘ de la germano **Ulrich Lins**.⁸⁸ Alia artikolo estis dediĉita al la sovetia vidpunkto pri lingva egaleco en internaciaj rilatoj. En la sama kunteksto **Verloren van Themaat**⁸⁹ recenzis libron, kiun Ermar Svadost en Sovetunio skribis en la rusa lingvo. Laŭ tio mondlingvo de la estonteco estos planlingvo, sed ne unu el la ekzistantaj planlingvoj, pro motivoj ideologiaj, sociologiaj kaj kulturaj. La tempo por krei vivipovan planlingvon ne estas matura, krom tio estus la tasko de la komunistoj konstrui ĝin.

Lapenna, pri kiu aperis sur la kovrilo de *Esperanto* tutpaĝa foto kaj kun kiu estis farita longa intervjuo, alvokis „daŭrigi kaj intensigi ĉiujn nunajn agadojn, kaj diskonigi ilin multe pli ol ĝis nun, kaj nombre fortikigi la Asocion.“ Li admonis, ke „troigoj, blufoj kaj fantaziaj ciferoj povas nur malutili kaj efektive jam multe ĝenis.“ Krome, li pravigis la translokadon de la Centra Oficejo al Rotterdamo, kiu siatempe kaŭzis kontraŭstaron.

⁸⁷ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Maurice_Jaumotte.

⁸⁸ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Ulrich_Lins.

⁸⁹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Willem_Verloren_van_Themaat.

En siaj 15 tezoj de Madrido Lapenna celis montri „la pozitivajn kaj negativajn flankojn de nia realaĵo“. Eble plej fortan atenton vekis la plej lasta tezo, per kiu Lapenna konstatis certan primitivismon en la Esperanto-movado, kiu bremsas la agadon laŭ la maniero du paŝoj antaŭen kaj unu malantaŭen. En aliaj tezoj Lapenna montris sin konvinkita pri la neceso de objektiva analizo, pri la bezono konservi lingvan unuecon, ke la kunlaboro devas esti egaleca, ke la faritaj decidoj devas esti demokrate observataj kaj ke la akceptitaj taskoj devas esti plenumitaj. La gvidan rolon en UEA li atribuis al la Centra Oficejo.

Ekde n-ro 755 (oktobro 1968) la titolo *esperanto* aperis sur la supre dekstra flanko de la revuo anstataŭ maldekstra kiel ĝis nun.

Pri Lenin kaj Esperanto laŭ la (dubindaj) memoroj de la latva esperantisto Ints Ĉaĉe skribis *Esperanto* en 1969. La aŭstra prezidanto Franz Jonas, alta protektanto de la viena UK en 1970, ricevis la titolpaĝon de la revuo.

La 25a Internacia Junulara Kongreso (IJK) de TEJO en Tyresö (Svedio) reeĥis al la protest-movado de la jaro 1968 per la „Deklaracio de Tyresö“, kies esencon Humphrey Tonkin, prezidanto de TEJO, klarigis jene: „La junularo vivas en mondo de politika mensogado, en ĉirkaŭaĵo detruata de ĥemiaj elfluaĵoj kaj neplanata urbigo kaj psika manipulado, kaj en socia kadro, kie la junularo estas konsiderata nur kiel ankoraŭ unu produkta povo, ankoraŭ unu konsumantaro.“ La nerespondeco etendiĝas ĝis la lingva kampo, Tonkin opiniis, ke en la nomo de la ekonomia progreso tutaj socioj submetiĝas al korodaj fremdaj influoj kaj al detruado de la propraj kulturo kaj lingvo. Laŭ li la grandaj naciaj lingvoj fariĝis, en la manoj de lertaj ekspluatantoj, armiloj por perforta adaptado de malpli riĉaj kaj malpli fortaj popoloj al la bezonoj de fremdaj ekonomiaj maŝinoj. TEJO konstatis, ke ĝi povos ludi rolon en la nuntempa studenta kaj junulara ribelado. Oni asertis, ke Esperanto per sia kontraŭstaro al la misuzo de naciaj lingvoj kaj pro sia idealo de lingva egaleco, estas en si mem protesta lingvo. TEJO prenis sur sin la taskon emfazi tion, samtempe oni atentigis, ke la Deklaracio de Tyresö neniel anstataŭas la ĝisnunan politikan neŭtralecon de TEJO. Sed en la batalo por homa respekto kaj konservado de la individua personeco, TEJO ne povas resti neŭtrala. La tasko de la Deklaracio de Tyresö estas montri la deziron de la junularo ekzameni la ecojn kaj la celojn de la esperantismo. Do, en tiu kongreso aŭdiĝis protesto kontraŭ la establitaj ordosistemoj kaj kontraŭ la neadekvateco de la monda lingva situacio. Per tiu pozicio TEJO kaj Tonkin klare manovris sin en la politike maldekstran angulon.

Alia protesto direktiĝis kontraŭ *Heroldo de Esperanto*, kiu komencis kritiki diversajn tendencojn en UEA. Sadler vidis en tiu periodaĵo aĉan opozicianon kaj riproĉis al ĝia redakcio, ke *Heroldo* intermiksas „gravajn atentigojn“ pri asociaj problemoj kun „tuta serio da misgvidaj aludoj, maljustaj komparoj, intenca prisilentado, miskomprenigoj kaj detruaj kritikoj“. Aldonita al la novembra numero de *Esperanto* estis moka imitaĵo de *Heroldo* kun la titolo ‚Doloroj de Esperanto‘.

En 1970 mortis Ernfrid Malmgren, eksa prezidanto de UEA. Ulrich Lins publikigis iun studon pri Lenin kaj Esperanto okaze de la centjara datreveno de la naskiĝo de Lenin. La revuo estis kunredaktata de **Akiko Woessink-Nagata**.⁹⁰ En la revuo aperis du-tutpaĝa reklamo de Philips, kio eble ne tute konvenis por organizaĵo, kiu ŝajne ne tiom simpatiis kun la kapitalismo.

En artikolo titolita ‚Kien iras Unesko?‘ Lapenna konstatis, ke „ĝi ja fariĝis preskaŭ universala, sed ĉiam pli kaj pli burokratiĝis.“ Li menciis, ke de diversaj flankoj aŭdiĝas riproĉoj pri la laboro de Unesko, ekzemple ke ĝi ĉiam malpli plenumas sian originalan taskaron. Ŝajnas, ke por la kulturaj taskoj preskaŭ ne plu restis mono. La laboron de UN, FAO kaj aliaj interŝtataj organizaĵoj karakterizas „manko de efikeco“. En tio oni arogis al si esprimi, ke ankaŭ UEA estas malkontenta pro la nuna karaktero de la laboro de Unesko.

En 1971 la islanda verkisto **Baldur Ragnarsson**⁹¹plendis, ke „tro multaj esperantistoj rilatas pasive al la rolo de Esperanto kiel internacia lingvo. Ili kontentiĝas uzadi la lingvon en lokaj esperantistaj medioj kaj malofte aŭ tute ne mencias ĝin ekster tiuj rondoĵoj. Ili nur sporade korespondas eble kun unu eksterlanda esperantisto, abonas unu Esperantan revuon aŭ neniun, malofte aĉetas Esperantan libron.“ Kaj Ragnarsson konis ankaŭ la konsekvencojn de tia nedezirinda sinteno: „Iom post iom tia

⁹⁰ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Akiko_Ŭoosink-Nagata.

⁹¹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Baldur_Ragnarsson.

pasiva rilato povas naski en la menso de tiaj personoj nur indiferenton kaj eĉ malfidon pri nia lingvo kaj ĝia destino. Ilia intereso velkas pro manko de konvinko, kaj fine ili fordrivas el la movado“-

Sadler verkis ankaŭ pri rasismo kaj rasa diskriminacio, sed oni ne troigis tiun temon. Ĉar evidente *Heroldo de Esperanto* daŭrigis sian kritikadon, Lapenna perdis la nervojn kaj alvokante, ke oni „fine ĉesu misprezenti aferojn en rilato kun UEA”, li persone analizis la „misprezantan kritikon“ de *Heroldo* sur kvin longaj paĝoj.

Malgraŭ la kritiko kontraŭ Unesko, *Esperanto* en novembro 1971 omaĝis al ĝia 25-jara jubileo kaj ne hezitis direkti maldiplomatiajn vortojn al tiu organizaĵo: „Nia ĉefa riproĉo estas, ke Unesko ne alfrontas la lingvan demandon en internaciaj rilatoj kiel unu el la plej radikalaj obstakloj al efika realigado de la idealoj, kiuj inspiris ĝian fondiĝon kaj kiuj estas la senco mem de ĝia ekzisto.“ Sadler vidis progresi la maleŭropiĝon de UEA; kompare kun antaŭ dek jaroj, kiam 78,4% de la individuaj membroj estis en Eŭropo, nun estas nur 75,4%. Kiel reprezentanto de la juna generacio, la italo **Renato Corsetti**⁹² pledis por la ekstereŭropigo de TEJO.

Komence de 1972 sekvis nova kritiko de Lapenna al la adreso de la esperantistoj, al kiuj li riproĉis, ke: „Bedaŭrinde, multaj el niaj asocioj malatentas la signifon de celkonscia laŭplana agado. Kompense, pluraj aliaj organizaĵoj, aŭ eĉ unuopuloj atingis bonajn rezultojn, eĉ rimarkindajn.”

Pro la kreskanta graveco de la radio-elsendoj en Esperanto la revuo enkondukis apartan rubrikon kun indiko de la frekvencoj de la programoj. En analizo pri „Kien la angla?” Don Harrow opiniis, ke la ŝajna avantaĝo de la potenco de la anglalingvaj landoj efektive estus nur potenciala. La disvastiĝo de la angla lingvo dependas de la potenco de la anglalingvaj landoj kaj ne de ĝiaj propraj ecoj. La sovetlitovo **Adomas Vaitilavičius**⁹³ filozofiumis pri la riĉeco de planita lingvo kaj konkludis, ke „la vortaro de Esperanto enhavas kelkcent milojn da nocioj kaj povas fiere rivali kun tiu de ajna nacia lingvo.“ Sur la paĝoj de la revuo aperis foto de marŝalo Josip Broz Tito kiel protektanto de la 58a UK en Beogrado (Jugoslavio).⁹⁴

De la bulgara flanko **Nikola Aleksiev**⁹⁵ prezentis la rilatojn inter **Georgi Dimitrov**⁹⁶ kaj Esperanto, kaj **Viktor Lebrun**⁹⁷ rakontis siajn memorojn pri **Lev N. Tolstoj**.⁹⁸ Orienta Eŭropo influis pli kaj pli en UEA: TEJO kongresis en 1972 en Pollando, en 1973 en Jugoslavio, Jerzy Uśpieński estis estrarano de UEA, du festivaloj okazis en Hungario.

Lingva egalrajteco en teorio kaj praktiko, la kongresa temo, kiun enkondukis Sadler, kiu fariĝis direktoro de la Centra Oficejo de UEA. Jugoslavio estis laŭdata kiel „ekzemplo de plurnacia, plurlingva lando, kiu faris grandajn klopodojn por trovi justajn kaj praktikajn solvojn de sia internaj lingvaj problemoj“.⁹⁹

En la beograda kongresrezolucio UEA laŭdis la pacprocezon de la „Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo“ (KSKE) en Helsinko, kiu „signas plian paŝon al politika malstreĉiĝo en Eŭropo.“ Brazilo estis akceptita kiel nova landa asocio.

Dum la beograda UK de 1973 klare elmontriĝis, ke la Komitato de UEA estis malkontenta pri sia prezidanto. Lapenna, kiu profesie fariĝis profesoro pri kompara juro (soveta kaj orienteŭropa¹⁰⁰) en la londona universitato, reagis al tiu malfido en decembro laŭ sia maniero. „Oni neniam forgesu, ke la demokrateco ne povas vivi sen minimuma socia disciplino. Foresto de elementa disciplino en internaciaj rilatoj kondukus al anarkio, terorismo kaj agreso. En politikaj demokratioj la malobservo de la socia disciplino fine kondukas al detruo de demokratiaj institucioj kaj al establo de totaleca

⁹² Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Renato_Corsetti.

⁹³ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Adomas_Vaitilavičius.

⁹⁴ Vd. piednoton 57.

⁹⁵ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Nikola_Aleksiev.

⁹⁶ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Georgij_Dimitrov, http://www.planlingvoj.ch/Georgi_Dimitrov_Esperanto.pdf. La bulgara Esperanto-movado devis adoregi GD kiel sanktulon, kvankam li estis nenio alia ol stalinisma kanajlo (vd. http://www.planlingvoj.ch/Georgi_Dimitrov_Bulgario.pdf).

⁹⁷ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Viktor_Lebrun.

⁹⁸ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Lev_Tolstoj.

⁹⁹ Vd. http://www.planlingvoj.ch/Jugoslavio_lingvopolitiko.pdf.

¹⁰⁰ Ĉi-teman fakan libron de Lapenna vd. sub <http://www.ivolapenna.org/verkoj/books/soviet.pdf>.

diktaturo. En sociaj-kulturaj organizaĵoj la foresto de memdisciplino kaŭzas formortadon kaj malaperon. En UEA, ĝuste pro ĝia alta grado de demokrateco, la malobservo de almenaŭ minimuma memdisciplino kaj de la implicita lojaleco certe kondukus ĝin en la abismon de disfalo, se la malbono ne estus ĝustatempe haltigita“. Feliĉe, por UEA prudento ĉiam venkis, Lapenna skribis.

En 1974 la grafika aspekto de la internaj paĝoj de *Esperanto* iomete ŝanĝiĝis. Kadre de la enciklopedia projekto lanĉita de Ulrich Lins, Reinhard Haupenthal kaj aliaj aperis la unua biografio pri **Marjorie Boulton**.¹⁰¹ En tiu ĉi jaro forpasis la aŭstra prezidanto Franz Jonas, „la ŝtatestro, kiu estis unu el ni.“¹⁰²

Sed kompreneble multe pli grandan atenton ricevis la sorto de Lapenna. La kunlaboro kun li en la estraro fariĝis malfacila, la etoso de la laborkunvenoj malagrabla, inter alie pro krizantaj financoj (fakte aperis malprofito de 60'000 guldenoj). La deklaro de la jugoslaviaj instancoj, ke Lapenna ne estas dezirata en Beogrado kiel prezidanto de mondorganizaĵo, aldone ŝarĝis la estraran laboron. Antaŭ la UK aperis en *Esperanto* granda artikolo de Lapenna sub la titolo „UEA en danĝero de malintegrigo“. En tiu kontribuo li menciis la „subfosan agadon de grupeto de personoj, kiuj pro diversaj, obskuraj motivoj klopodas detrui la atingojn kaj grave kompromiti ĉiujn objektivajn valorojn en la Esperanto-movado.“ Al tiuj grupoj li riproĉis, ke en „sekretaj kunvenoj kun la ĉefa punkto de la tagordo ‚Kiel faligi Lapenna?‘ ĉiam la samaj personoj misuzis la prestiĝan pozicion de UEA, ekspluatante ĝian neŭtralecon.“ Lapenna parolis pri „atencantoj“ kaj „absurdaj atakoj“ kontraŭ li. Kaj li admonis: „Se oni ne haltigas plej energie tian subfosan agadon, ne nur la plua progresado, sed eĉ la ekzisto mem de Esperanto kiel lingvo estos en danĝero.“ Kaj, sentante ke verŝajne li ne ricevos la plimultan subtenon de la Komitato, li komencis argumenti per minacoj: „Se mi ne ricevos la plimulton, mi rigardos tion kiel malvenkon de tiu tuta idearo, kiu markas la modernan UEA, kaj mi foriros de ĉio sen amaro, liberigante tiel plene mian tempon kaj energion por mia faka, scienca laboro. Estu absolute klare: aŭ oni plu deziras ‚havi Lapenna‘ sen abscesoj sur la organismo de UEA, aŭ oni havos la abscesojn sen mi. Tio estas mia lasta, senkompromisa vorto!“ Por substreki sian pravecon, en majo Lapenna konfirmis, ke li ricevis „amason da esprimoj de solidareco kaj persona simpatio“. En la somera numero Lapenna ankoraŭ publikigis „sugestojn pri agadprogramo de UEA por la sekvanta trijara periodo (1974-77).

Kiam en la unua tago de la Universala Kongreso, kiu okazis en Hamburgo evidentiĝis, ke Lapenna ne ricevos la necesan apogon de la (renovigita) Komitato, li deklaris jam en la Solena Inaŭguro, ke li forlasos ĉiujn postenojn en UEA. Post la „puĉo“ de Hamburgo, kiel iuj nomis la eventon,¹⁰³ Esperanto anoncis „generacian ŝanĝon“. Sur la septembra kovrilo troviĝis Lapenna apud Humphrey Tonkin, kiu estis elektita kiel nova prezidanto de UEA. Lapenna estis laŭdata de *Esperanto* kiel „plej kompleta gvidanto, kiun la Esperanto-movado konis en sia historio.“ Ekster ĉiaj duboj, la revuo skribis, ke Ivo Lapenna estas la plej granda figuro sur la ĝisnuna organiza kampo en la historio de la Esperanto-movado. „Li kunfandis la idealismon de Zamenhof, la organizan senton de Hodler kaj la oratoran kapablon kaj erudicion de Privat. Pri falo de Lapenna oni ne volis paroli, nur pri stafeta pludono de la torĉo, „natura kaj necesa por la movado, kiu volas konkeri la mondon“. Sur la foto oni vidis la vizaĝon de fiera, ofendita kaj venkita personeco. Iom ruze, Tonkin mem rezignis en sia unua artikoleto pri laŭdado de Lapenna, dirante, ke Lapenna tion verŝajne ne ŝatus. Tamen, Tonkin montris sin ŝokita de la ekziĝo de Lapenna. Ĉar iom skandalece ankaŭ aliaj gvidantoj ekziĝis, Tonkin komentis: „Notante kaj bedaŭrante tiujn ekziĝojn, mi povas nur esprimi mian malĝojon, ke tiuj homoj sentis sin devigitaj forlasi la aktivan rolon, kiun ili ludis en la Asocio. Tamen, niaj admiro kaj estimo de iliaj kontribuoj al UEA restas grandaj kaj sinceraj.“

Samtempe estis anoncite, ke la ĝenerala gvidlinio de UEA restos kiel Lapenna difinis ĝin.

Kiel ĉefajn prioritatojn Tonkin anoncis la resanigon de la financoj, la enkondukon de nova laborstilo, kaj certigon de la neŭtraleco, kiu „estas kaj restos la ĝusta vojo por nia Asocio“. **Werner Bormann**¹⁰⁴ el FRG fariĝis vicprezidanto, **Flóra Szabó-Felső**¹⁰⁵ el Hungario kaj **Stanisław Świstak**¹⁰⁶ el Pollando estraranoj.

¹⁰¹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Marjorie_Boulton.

¹⁰² Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Franz_Jonas.

¹⁰³ Vd. <https://www.youtube.com/watch?v=IxtP33k3EM0>, <http://www.ivolapenna.org/verkoj/books/hamburgo.pdf>.

¹⁰⁴ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Werner_Bormann.

Periodo Milojević (1974-1984)

Cetere la aprila numero 820 estis la plej lasta, kiun Sadler redaktis. En la CO okazis ŝanĝoj: tri kunlaborantoj forlasis la stabon, kaj fakte ankaŭ Sadler prezentis sian demision. Sed li pretis resti kiel direktoro, se **Simo Milojević**¹⁰⁷ akceptas la taskon de la redaktoro por senŝarĝi lin.

Eble al la ironio de la historio apartenis ankaŭ la fakto, ke post la hamburga kongreso aperis la monografio ‚*Esperanto en Perspektivo*‘,¹⁰⁸ kiu estis redaktita sub la gvido de Lapenna kaj en kunlaboro kun Ulrich Lins kaj **Tazio Carlevaro**.¹⁰⁹

Malgraŭ sendube grandiozaj faroj kaj fanfaronoj la epoko de Lapenna postlasis ŝajne neeviteblan mizeron, kaj moralan kaj materian. Ĝin oni devis, kaj volis, rapide reekvilibrigi. Por la nova prezidanto Tonkin gravegis tri principoj: forta organiziteco je ĉiuj niveloj de la movado, novaj iniciatoj devas baziĝi sur la konservado de niaj jamaj atingoj, utiligo de ĉiuj homfortoj ĝis maksimumo. Ankaŭ la iom riproĉemaj vortoj de Tonkin frapis, kiu bedaŭris, ke „kelkaj homoj forlasis la organizitan movadon, ĉar ili nenion interesan trovis en ĝi. Kiam premis devoj familiaj aŭ profesiaj, aŭ kiam ili trovis novajn interesojn, ili simple fordrivis. Unu el niaj ĉefaj taskoj estas rekapti la intereson de tiuj homoj.“ Krome: „Aliaj homoj, pretaj agi por Esperanto, forlasis la aktivan Movadon, ĉar ni misuzis iliajn talentojn. Jen ni postulas, ke homo talenta pri unu fako laboru en tute alia, jen ni lasas al iu homo labori en evidente malfekunda grundo, dum apude fekunda grundo restas nekultivata.“ Sadler konstatis, ke inter la ekŝiĝintoj troviĝas ankaŭ iuj, kiuj ekŝiĝis pro malŝato de unu aŭ alia el la novaj estraranoj, sed tiaj ekŝiĝoj de membroj estis la rezulto de la jaroj antaŭ Hamburgo kaj koncernis homojn, kiuj konfliktis, ĉu persone, ĉu ideo kun Lapenna aŭ alia estrarano. Tonkin konsideris internajn reformojn en la asocio neeviteblaj.

Post la malbela jaro 1974, sur la titolpaĝo de januaro 1975 estis skribite: „1975 estu bela!“

En tiu embarasa situacio iu grupo de malkontentuloj serĉis novan vojon. Kiam Sarlanda Esperanto-Ligo en Germanio anoncis la unuan internacian konferencon de la „neŭtrala Esperanto-movado“ UEA-redaktoro Milojević reagis alergie kaj akre kondamnis en sia revuo la novan skisman minacon, skribante: „Per la blufado kaj splitiga nomo de la aranĝo en Saarbrücken, SEL aroge uzurpas la statutajn prerogativojn de UEA, neante samtempe la tutan ĝisnunan historion de la neŭtrala internacia Esperanto-movado kaj kalumniante ĉiujn ĝisnunajn gvidantojn de tiu movado.“ Kiel prelegantoj en la konferenco en Sarlando estis anoncitaj **Günther Becker**, **Jean Thierry**, **Helmut Sonnabend** kaj **Marianne Vermaas**,¹¹⁰ lojalaj adeptoj de Lapenna, kiuj protestis kontraŭ lia eksigo. La ĉefakuzita de UEA fariĝis **Reinhard Haupenthal** esperantologo kaj eldonisto el Sarlando,¹¹¹ kiu ekŝiĝis el UEA jam en 1971. Milojević skribis pri tiu renegata samideano: „Konate estas, ke s-ro Haupenthal kapablas labori, sed ne estas malpli konate, ke li malkapablas kunlabori.“¹¹² Fine: „Anstataŭ demokrate akcepti la demokratajn rezultojn de la elektoj en Hamburgo, la kritikantoj de la nuna gvidantaro, sub la etikedo de ‚neŭtraleco‘ propagandas fakte obskuran makartismon kaj revivigas la fantomojn de la ‚malvarma milito‘“. La reciprokaj kritikoj kaj ofendoj kaŭzis profundan malamon inter la koncernataj homoj, kiu restis por ĉiam.

Dume, Lins proponis sentabuigi la historion de la Esperanto-movado kaj **Vilmos Benczik**,¹¹³ kvazaŭ heredante la fakon de Auld kaj Haupenthal, ofertis siajn pensojn pri la Esperanto-literaturo.

Alloga afero por UEA estis, ke la ĝenerala direktoro de Unesko, kiu ekde 1974 estis la senegalano **Amadou Mahtar M’Bow**,¹¹⁴ simpatiis kun la Esperanto-movado lige kun sia apogo al la „Nova

¹⁰⁵ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Flóra_Szabó-Felső.

¹⁰⁶ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Stanisław_Świstak.

¹⁰⁷ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Simo_Milojević.

¹⁰⁸ Vd. <http://www.ivolapenna.org/verkoj/books/persp.pdf>.

¹⁰⁹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Tazio_Carlevaro,

http://www.plansprachen.ch/39_ENCYCL_INTERLINGVISTIKO.pdf, p. 4-5.

¹¹⁰ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Günther_Becker, https://eo.wikipedia.org/wiki/Jean_Thierry, https://eo.wikipedia.org/wiki/Helmut_Sonnabend, https://eo.wikipedia.org/wiki/Marianne_Vermaas.

¹¹¹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Reinhard_Haupenthal.

¹¹² Vd. la koncernan memoraĵon de Carlo Minnaja sub. <http://www.cb.uu.se/esperanto/ees8.pdf>, p 57-68.

¹¹³ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Vilmos_Benczik.

¹¹⁴ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Amadou-Mahtar_M'Bow.

Monda Informa kaj Komunika Ordo“ (kiun la Okcidento, precipe Usono kaj Britio, suspektis kiel subfosan laboron kontraŭ la demokratio kaj la gazetara libereco). La ĝenerala direktoro de Unesko aperis sur la kovrilpaĝo de *Esperanto*, sendis salutmesaĝojn al la jubilea 60a UK en Kopenhago (1975) kaj al la 61a UK en Ateno (1976) kaj en 1977 eĉ persone ĉeestis la solenan inaŭguron de la 62a UK en Rejkjaviko, Islando. Poste li denove telegrame salutis la partoprenantojn de la 63a UK en Varna, kien li delegis personan reprezentanton. Lia mesaĝo sonis kiel mielŝmiraĝo al la buŝoj de la esperantistoj, kvankam la vorto Esperanto ne estis menciita en la mesaĝo, sed estis parolate nur pri „komuna lingvo“. En 1978 M’Bow ankaŭ parolis kadre de la 13a Monda kongreso de fremdlingvaj instruistoj en Lucerno (Svislando) pri plurlingvismo, tamen sen menciigi Esperanton. En januaro 1979 M’Bow, kiun la esperantistoj adoregis, akceptis UEA-delegacion en Parizo (kiun konsistigis Tonkin, Chicot, Despinney, Guéront). M’Bow diris: „Mi bone memoras la etoson de via kongreso en Rejkjaviko. Temis pri vere frateca etoso. Se ĉiuj homoj povus komunikiĝi kiel vi, ne ekzistus la nunaj streĉitecoj en la mondo. En neniu alia loko mi renkontis tiun etoson.“ Kaj: „Mi devas diri, ke en Rejkjaviko mi havis kompleksion, nome ke mi ne esprimis min en Esperanto. Se eventuale mi ĉeestus denove vian kongreson, mi dezirus paroli en Esperanto.“ En *Esperanto*, januare 1979, oni konkludis pri la rilatoj kun M’Bow jene: „Dum unu el la renkontiĝoj en Rejkjaviko antaŭ du jaroj s-ro M’Bow diris, ke esperantistoj nun povas kalkuli, ke ili havas amikon en Parizo. Ankaŭ tio sonis tiam kiel simpla ĝentilaĵo. Sed nun, kiam ni ĉi tie listigas ĉiujn afablaĵojn kaj ĝentilaĵojn de la ĝenerala direktoro de Unesko rilate al Esperanto kaj UEA, estas tute klare, ke ni ja havas amikon en Parizo kaj ke la Esperanto-movado povas fieri, ke inter ĝiaj apo-gantoj troviĝas s-ro Amadou-Mahtar M’Bow, unu el la plej prestiĝaj kaj influaj personecoj en la nun-tempa internacia vivo.“

Kiel dirite, M’Bow estis konsiderata kaj malŝatata de parto de la okcidenta mondo kiel suspektinda advokato de la evolulandoj, precipe en Afriko, Azio kaj Latinameriko, tiel ke do aŭtomate aperis konflikto kun kelkaj okcidentaj potencoj, precipe Britio kaj Usono sub prezidanto Reagan, kiu finfine rezignis pri Unesko. Ĉi tio kaŭzis al la mondorganizo gravan krizegon, kiu povis esti solvita nur per la ekŝiĝo de M’Bow en 1987.

La oficperiodo de M’Bow kongruis kun diversaj konsiderindaj progresoj de la Esperanto-movado ĝuste en kelkaj el tiuj ekstereŭropaj evolulandoj, kiujn M’Bow tiel favoris. Gvidaj aktivuloj de UEA, kiuj probable apartenis al la politike maldekstra spektro de Eŭropo kaj Nordameriko, ĝojis pri tiu evoluo kaj apogis ĝin laŭeble, kvankam la materiaj rimedoj de UEA nature mankis. Inter alie, Esperanto iom furoris en *Irano*, kiam **Mohammad Saheb-Zamani**¹¹⁵ aperis kaj ‚enkondukis’ Esperanton en la teheranan universitaton, kie li gvidis Esperanto-kursojn. Kiam oni poste demandis lin pri la kialoj de la interesiĝo de iranoj pri Esperanto, Saheb-Zamani listigis plurajn, ekzemple ke la homoj serĉas ion por plenigi sian vivo-vakuon per ia terapia okupo (1992). En 1979 la fanatika ŝija ajatolo Ruhollah Ĥomejni revenis el Francio al Irano, kie li enkondukis la „Islaman revolucion“ kaj proklamis la „Islaman respublikon“, kiu subpremis ĉiujn liberecojn, precipe tiujn de la virinoj, kiuj estis kutimaj en Okcidento, kaj establis teroran islamisman reĝimon, kiu daŭras ĝis nun. En *Hinda Unio*, kie en 1982 fondiĝis Federacio Esperanto de Barato (FEB), viglis la juna lingvisto **Probal Dasgupta**,¹¹⁶ bengala maoiŝto, kiu iam fariĝis prezidanto de UEA. En *Vjetnamio*, kie en 1956 estis fondita Vjetnama Pacdefenda Esperanto Asocio (VPEA),¹¹⁷ kreskis la nombro de esperantistoj, malgraŭ la kruela milito, kiu tie furoris de la 60aj jaroj kaj kiu fine kaŭzis entute pli ol kvin milionojn da mortintoj. Al la solidareco kun la vjetnama popolo, kiu estis esprimita en la senco de la propagando de la Orienta Bloko, aliĝis ankaŭ iuj maldekstruloj (ĉefe komunistoj) en UEA kaj tiel do malkaŝis sian politikan vidpunkton. En Ĉinio, kiu estis regata de la komunistoj de Maŭ Zedong kaj kie la Esperanto-movado jam delonge ekzistis, eldonante la ŝtatan propagandan revuon *El Popola Ĉinio*, kiun oni amase distribuis ankaŭ en eksterlando, furoris la t.n. „Kultura revolucio“, kiu kaŭzis aliajn kelkmilionojn da viktimoj, pri kiuj la Esperanto-gazetaro ne raportis, ĉar evidente la esperantistoj ne sentas sin koncernataj de tiaj temoj kaj problemoj.¹¹⁸ Male, en 1976 aperis la Esperanto-traduko de la ‚Elektitaj Verkoj’ de Maŭ Zedong, kiu estis laŭte anoncita en la tuta movado. Ĉina Esperanto-Ligo provis aliĝi al UEA en 1979, sed la UEA-

¹¹⁵ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Mohammad_Hasan_Naser-eddin_Sahebzamani.

¹¹⁶ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Probal_Dasgupta.

¹¹⁷ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Vjetnama_Pacdefenda_Esperantista_Asocio.

¹¹⁸ Lau la t.n. *Nigra Libro de la Komunismo* (1997), en komunisma Ĉinio estis nombritaj 65 milionoj da mortviktimoj, kio estis la plej granda parto de la mortviktimoj dum la komunisma tempo entute kun minimume cent mil mortviktimoj.

estraro decidis, ke la statuto de tiu asocio estas neneŭtrala kaj tial neakceptebla. Kiam komence de 1980 UEA ricevis novan asocian statuton, kiu permesis la aliĝon de neneŭtralaj Landaj Asocioj, se ili respektis la statuton kaj neŭtralecon de UEA, ĈEL povis aliĝi en tiu jaro al la monda asocio.¹¹⁹ Akiko Woessink vojaĝis al Ĉinio, Japanio kaj Koreio kaj vaste raportis en la revuo pri la faritaj spertoj kaj kontaktoj, kaj Paul Neergard interesiĝis pri lingvaj problemoj kaj lingvopolitiko en evolulandoj. La esperantistoj ĝojis pri la laŭdiraj aŭ ŝajnaj progresoj de la Esperanto-movado en tiuj landoj, inter kiuj troviĝis ankaŭ Pollando, Hungario kaj Bulgario, kiuj estis regataj de sovet-komunis-maj partioj, kiuj senskrupule subpremis politike la proprajn popolojn laŭ la volo de Moskvo, ignorante la protestojn de la libera mondo. Nature, la grandstilan lezadon de la homaj rajtoj, kiuj okazis en tiuj landoj, oni nete prisilentis en la revuo *Esperanto*, ĉar oni ja estis politike neŭtrala kaj celis precipe antaŭenpuŝi Esperanton (kiel lingvon de la paco, demokratio, libereco ktp. ktp.) en tiuj landoj. La politiko de UEA kaj de la Esperanto-movado faris la impreson, ke oni preferas flatadi la potenculojn de la mondo, eĉ se temis pri teruraj diktatoroj (de Tito ĝis Castro), se ili montris simpatian kun Esperanto, kaj evitis rilati kun opoziciaj, demokratecaj kaj liberecaj movadoj de la civilsocio en la koncernataj landoj, ĉar oni timis, ke la fragilaj progresoj de Esperanto en tiuj landoj povus esti neniigitaj kaj la tieaj esperantistoj persekutataj kiel siatempe en Sovetunio kaj aliloke. En ĉi tiu lando la Esperanto-movado ĵus renaskiĝis post la morto de Stalin surbaze de interlingvistikaj okupoj, sed ankaŭ per la starigo de sociparalelaj kluboj, kies anoj celis iom emancipiĝi de la rigida politike konformisma vivo en Sovetunio, kiu estis strikte kontrolata de la komunisma partio kaj de la sekreta servo KGB kaj neniigis ĉiuspecan sendependan privatan iniciaton. La rilatoj inter sovetiaj kaj alilandaj esperantistoj estis tre kuriozaj, streĉitaj kaj restis por ambaŭ partoj granda defio, ĉar oni konsideris sin reciproke se ne nepre kiel rektaj malamikoj, do tamen kvazaŭ kiel estaĵoj de diversaj planedoj.

Diversaj ŝtatestroj esprimis sin favore pri Esperanto, ekzemple la islanda. Okaze de la jara konferenco de ELNA en 1977 prezidento Carter sendis salutmesaĝon. Dum Pola Radio en Varsovio havis sian firman voĉon en Esperanto, ankaŭ Vatikana Radio komencis utiligi ĝin. Kvankam tiuj radiostacioj disaŭdigis grandparte politikan aŭ religian propagandon, ili tamen ĝuis grandan popularecon inter esperantistoj, ĉar ili elsendis en la lingvo Esperanto. Pli kaj pli aperis korespondpetoj el plej diversaj landoj, kie troviĝis esperantaj aŭskultantoj de tiuj radiostacioj, al kiuj apartenis ankaŭ Svisa Kurtonda Radio en Berno, aŭ legantoj de Esperanto-gazetoj, kaj la plej belajn fraŭlinojn oni eĉ prezentis per foto.

La bulgaran arton diskonigis la kantisto **Veselin Damjanov**,¹²⁰ kiu iusensce estis nova eldono de la ekssovetiano **Nikolaj Rytikov**.¹²¹ En 1977 UEA havis 40 landajn asociojn, kaj en 1981 TEJO kongresis en Meksiko.

Apoge al la politiko de Unesko, en UK 1979 (Lucerno) Tonkin pledis por nova lingva ordo ligo kun la tridekjariĝo de la „Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj“.¹²² Ankaŭ **Claude Piron**,¹²³ Esperanto-verkisto en Svislando, kaptis la fadenon pri „maljusta lingva komunikado“. Samtempe, la usona esperantisto Richard Wood konstatis, ke „ni denove mankas en konsultlibroj“ (kiel en internaciaj bibliografioj, k.s.). En Budapeŝto (Hungario) UEA malfermis filion, kaj la hungaro Csaba Lendvay, poste la polo Jan Koszmaluk fariĝis prezidantoj de TEJO. La denaska polino **Barbara Despi-ney**¹²⁴ reprezentis TEJO en ĉe la jnulara fako de Unesko. Esperanto ankaŭ iom prosperis en la komerca turismo, scienca kaj faka agado, precipe interlingvistiko, la akademia disciplino de la planitaj lingvoj (aŭ planlingvoj).

Sub Milojević la revuo ricevis modernan aspekton kaj profesinivelan redaktadon kun vere tre varia kaj interesa enhavo. UEA kaj la Esperanto-movado faris maturan impreson sur alta nivelo kaj preta por ĉiam novaj konkeroj tutmonde. En multaj landoj Esperanto ŝajnis esti alloga afero, de kiu oni abunde profitadis. Tre sukcesaj Universalaj Kongresoj en la jardeko inter 1975 kaj 1987 okazis inter

¹¹⁹ En 2004 aperis en Pekino sufiĉe leginda retrospektiva „Konciza Historio de la Ĉina Esperanto-Movado“, kvankam ĝi estis verkita el ĉina komunisma vidpunkto kaj do restis historiografie ege unuflanka (vd. <https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=6541>).

¹²⁰ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Veselin_Damjanov.

¹²¹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Nikolaj_Rytikov.

¹²² La tekston en Esperanto vd. sub <https://www.ohchr.org/EN/UDHR/Pages/Language.aspx?LangID=1115>.

¹²³ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Claude_Piron.

¹²⁴ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Barbara_Despi-ney.

alie en Varna (kun 4400 partoprenantoj), Lucerno, Stokholmo, Brazilio, Antverpeno, Budapeŝto (preskaŭ 5000 partoprenantoj), Vankuvero, Augsburg, Pekino, Varsovio (6000), ktp. La lucerna kongreso eĉ ricevis la viziton de Robert Muller, sekretario de Ekosok. En sia parolado li diris inter alie: „Strange, la lingvo ŝajnas esti nur duaranga zorgo. Lingvoj similas naciojn, ili ekzistas kiel fruktoj de longa historio kaj evoluo en medio pli malpli izolita; ili estas realaĵo, kiun ekstreme potencaj ri-medoj defendas.“ Muller bedaŭris, ke kiam la interŝtata organizo naskiĝis, ĝi ne alprenis universalan lingvon. Oni tiel preterlasis grandan historian okazon. Pri Esperanto li opiniis, ke tiurilate la Esperanto-movado povas ludi gravegan rolon. Ĉe la starigo de monda demokratio utilis laŭ li la uzo de universala lingvo. Li finis sian paroladon per jenaj vortoj: „La mondo bezonas vin. Unuiĝintaj Nacioj bezonas vin.“ Tonkin malfermis sian lucernan paroladon per jenaj frazoj: „Mi sentas, ke la Esperanto-movado, kaj precipe UEA, estas sur la sojlo de nova epoko. Tiu epoko portas pli proksimen la venkon de nia lingvo.“ „Esperanto kaj la Esperanto-movado posedas potencon eksterordinaran.“ „Esperanto venkos per si mem.“ „Kiel lernintoj de Esperanto, kiel eltrovintoj de tiu miraklo de la homa komuni-kado, ni tiris sur nin, vole-nevole, la moralan devon antaŭ la mondo ĝin disvastigi kaj ĝin sukcesigi.“ Kaj pri la neŭtraleco de UEA: „UEA ne politikigis, kiel oni siatempe prognozis, ne fendiĝis, ne perdis sian neŭtralecan vojon, ĝi unueciĝis ĝis nivelo longe nekonata en niaj rondoj. La parolantoj de Esperanto ne kontentiĝas je onidiroj kaj duonveroj, kaj ili estas pretaj submetiĝi al la komuna volo kaj la komuna idealo, se ĝi estas prezentata senvuale kaj maksimume honeste.“ „Oni estas neŭtrala por esti kiel eble plej vaste universala – por enpenetri ĉiujn landojn, sendepende de ilia politika pozicio aŭ ilia rilato al aliaj ŝtatoj. Sekve neŭtraleco devas esti unuavice liberiga kaj vastiga, ne negativa kaj striktiga. Tro ofte oni konceptas la neŭtralecon de nia movado kiel tian negativan fenomenon. Oni tro ofte uzas la koncepton por fingromontri, por akuzi, por ŝpruci venenon.“ Samtempe Tonkin plendis, ke la Esperanto-movado ne estas sufiĉe rekonata; li atentigis pri la “lingva problemo” kaj kritikis la „homojn, kiuj ne komprenas la dinamikon de lingvoj: ili ne komprenas, ke lingvoj povas esti instrumentoj de subpremo kaj diskriminacio.“ Kaj li konkludis, ke „Esperanto estas tiel granda miraklo, ke ĝi estas malfacile kredebla ekstere. Sed la tempo kaj la fluoj de eventoj laboras por ni.“

Do, estis multaj kialoj por fieri kaj la penoj post Montevideo valoris. En tiu senco Tonkin alvokis al kunlaboro por la komuna bono. Ĉu Rotterdamo estas la taŭga urbo, ĉar UEA estas la „sola grava internacia“ organizaĵo, kies sidejo troviĝas en ĉi tiu havenurbo, Tonkin ŝajne komencis dubi. Bruselo estus pli alloga, sed la translokado de la CO tien estus giganta laboro kaj devus esti bone preparata.

En julio-aŭgusto unufoje aperis la Estrara Raporto en tiu formo kiel oni konas ĝin ĝis hodiaŭ. Ĉefaj prioritatoj por la prezidanto de UEA estis jenaj: konvinki la intelektulojn kaj universitatojn en la diversaj landoj pri la fenomeno de la “lingva diskriminacio” kaj bezono de internacia lingvo, influu la vastajn tavolojn de ordinaraj civitanoj pri la valoro de internacia komunikado. Milojević atentigis pri la vaneco de kongresaj programoj, se ili ne estas bone preparataj.

En 1976 mortis la hungara Esperanto-verkisto **Kolomano Kalocsay**, al kiu estis dediĉita la marta numero,¹²⁵ en 1977 forpasis **Pál Balkányi**,¹²⁶ **Eugen Wüster**¹²⁷ kaj la konata mongola esperantisto **Rinĉen**,¹²⁸ en 1978 sekvis **Lajos Tárkonyi**,¹²⁹ en 1979 **Andreo Cseh**,¹³⁰ en 1982 **Marinko Gji-voje**,¹³¹ en 1985 **Lajos Kökény**,¹³² en 1987 **István Szerdahelyi**.¹³³ Do, preskaŭ ĉiuj iamaj famaj hungaroj de tiu generacio iom post iom malaperis kaj sendube postlasis grandan vakuon en la Esperanto-movado. La pli maljuna hungara verkisto **Julio Baghy** mortis jam en 1967.¹³⁴

¹²⁵ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Kálmán_Kalocsay.

¹²⁶ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Pál_Balkányi.

¹²⁷ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Eugen_Wüster.

¹²⁸ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Rinĉen_Yöngsiyebu_Bjambyn.

¹²⁹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Lajos_Tárkonyi.

¹³⁰ Vd. piednoton 41.

¹³¹ Vd. piednoton 62.

¹³² Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Lajos_Kökény.

¹³³ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/István_Szerdahelyi.

¹³⁴ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Julio_Baghy.

La intereso pri interlingvistiko kaj esperantologio kreskis en tiu periodo. Dasgupta verkis longan artikolon por analizi kial Esperanto ne interesas lingvosciencistojn. **Detlev Blanke**¹³⁵ replikis, ke ja ekzistas intereso flanke de lingvistoj kaj menciis multajn ekzemplojn el GDR. **Michel Duc Goninaz**,¹³⁶ franca instruisto de la rusa lingvo, kritikis en siaj recenzoj, ke diversaj sciencaj libroj el socialismaj landoj (redaktitaj de Blanke) entenas tro da partecaj kaj dogmemaj tendencoj, kiuj estas evitindaj.

En Varna Tonkin diris al la kongresanoj, ke UEA ne estas iu oficejo, sed „UEA estas ni ĉiuj“. Redaktoro Milojević avertis, ke la Movado estas universala, sed ni pensas kaj agas eŭrope.

Fine, oni povis observi, ke en UEA ŝajne ekregis speco de lingvopolitika aŭ lingvofilozofia fundamentalismo. En artikolo kun la titolo „Esperanto mem estas homa rajto“ estis skribite: „Jam dum multaj jaroj ni daŭre atentigas, ke la lingva problemo senĉese akriĝas kaj kondukas la mondon al plena komuna kaoso aŭ al kultura, anstataŭ politika, koloniismo.“ Tio estis ne pli ol pure popolisma aserto de politikaj ideologoj sen ajna scienca pruvo.

En junio 1980 la revuo *Esperanto* omaĝis al sia 75-a jariĝo, kaj Tonkin transdonis la prezidantecon al la belgo **Grégoire Maertens**,¹³⁷ kiu ne estis figuro de laŭtaj frazaĵoj kiel Lapenna kaj Tonkin; tiu modesta flandra aktivulo ĉefe okupiĝis pri la financoj de UEA kaj iniciatis aŭdacajn entreprenojn kiel la renovigon kaj vastigon de la rotterdama domo kaj subtenis la ekziston de la t.n. Grafika Centro Antverpeno, kiu estis ideo de Victor Sadler.¹³⁸ Tonkin restis estrarano (pri esploroj, edukado kaj kunordigo de eksteraj rilatoj).

La “Manifesto de Raŭmo”,¹³⁹ ĉefe verkita de **Giorgio Silfer**¹⁴⁰ kaj **Jouko Lindstedt**,¹⁴¹ kiu estis proklamita en 1981 rando de la 36a IJK en Raŭmo (Finnlando), signifis por la bengalo Dasgupta „intelektan bankroton fare de tre inteligentaj homoj“, ĉar li malfacile povis kompreni, kial tiaj homoj povas nei la imperiisman rolon de la grandaj lingvoj (precipe de la angla). En tiu manifesto la subskribintoj inter alie avertis, ke la faligo de la angla lingvo ne devus esti tasko nek zorgo de la esperantistoj. Laŭ Dasgupta la celaro de Raŭmo signifis kontraŭdiron al la “Deklaracio de Tyresö”, por kiu zorge pledadis la 68a generacio. La nomita manifesto servis por establi la t.n. “raŭmismo”,¹⁴² kiu komprenis sin, kadre de la kritiko de la “praceloj”, kontraŭa ideologio al la t.n. “finvenkismo” (aŭ “pracelismo”), kiu estas praktikata de UEA dekomence. Do, ideologiaj kontraŭdiroj ne malofte kontraŭstaris unu la aliajn en la Esperanto-movado. Sekve, Silfer kaj lia edzino **Perla Martinelli**,¹⁴³ ĉefredaktorino de *Literatura Foiro*,¹⁴⁴ komplete distanciĝis de UEA kaj for de ĉia sovaĝeco de la amturismema propagandisma amasmovado, al kiu UEA transformiĝis, preferis daŭrigi, kun sidejo en Svislando, labori kadre de sia “Kooperativo de Literatura Foiro”, donante la prioritaton al kulturaj kaj literaturaj aktivecoj, kio restis eliteca alternativo, kiun tamen elektis nur relative malmultaj esperantistoj.¹⁴⁵ Kiel montris la ekzemploj de Lapenna, Silfer kaj aliaj (pri SAT ni tute ne parolu), la UEA-movado alergie kaj negative reagis al ajnaj provoj de skismo kun la celo kritiki la ĉefan komunan organizaĵon de la esperantistoj kaj ties netuŝeblajn kvazaŭ-sanktulojn. Per tiu sinteno UEA pli kaj pli similis al totalisma centrisma movado laŭ la modelo de komunisma aŭ alia politika partio, katolika eklezio aŭ ajna

¹³⁵ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Detlev_Blanke. En 2013 fariĝis konate, ke Blanke servis ekde 1966 kiel neoficiala (poste oficiala) informanto de la Ministerio pri Ŝtata Sekureco de GDR. Kvankam oni suspektis tion jam delonge, ŝajnas ke neniu vere sciis tion en UEA. Malgraŭ tio Blanke povis fariĝi honora membro de UEA.

¹³⁶ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Michel_Duc_Goninaz.

¹³⁷ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Grégoire_Maertens.

¹³⁸ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Grafika_Centro_Antverpeno.

¹³⁹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Manifesto_de_Raŭmo.

¹⁴⁰ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Giorgio_Silfer, http://www.planlingvoj.ch/29_ENCYCL_ESPERANTO_S.pdf, p. 6.

¹⁴¹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Jouko_Lindstedt.

¹⁴² Vd. <https://eo.wikipedia.org/wiki/Raŭmismo>.

¹⁴³ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Perla_Martinelli, http://www.planlingvoj.ch/25_ENCYCL_ESPERANTO_M-N-O.pdf, p. 2-3

¹⁴⁴ Vd. http://www.planlingvoj.ch/23_ENCYCL_ESPERANTO_L.pdf, p. 11.

¹⁴⁵ En postaj jaroj Silfer fondis sian propran movadon nomatan “Esperanta Civito”, kiu trovis ĉefe negativan recenzadon en la tradicia Esperanto-movado, kiu estis esence dominata de UEA, restante la privata afero de malgranda grupo de amikoj de Silfer, kiu ankaŭ varbis por Esperanto en la internaciaj PEN-medioj. En 1993 li akaparis Kulturano Centron Esperantistan en La Chaux-de-Fonds, kiu en la sekva tempo perdis sian iaman signifon kiel Esperanto-institucio, ĉefe funkciante kiel privata rezidejo de Silfer kaj Martinelli, kiuj fariĝis svisaj civitanoj. (Vd. http://www.planlingvoj.ch/13_ENCYCL_ESPERANTO_C-D-E.pdf, p. 4-11).

religia sekto ol al demokratia organizaĵo kun plurisma opinistrukturo, kvankam en UEA nature ĉiu individuo havis la liberecon diri, skribi kaj fari kion li aŭ ŝi volis. Sed ĉiu kritiko de interne kaj ekstere kontraŭ Esperanto kaj la movado, apostrofita kiel “sankta afero”, estis konsiderata kiel herezo kaj ankaŭ traktata kiel tia. Tiu dogmema sinteno kaŭzis, ke UEA kaj la Esperanto-movado perdis multajn valorajn kaj inteligentajn homojn, kiuj vidis en tiu movado ne pli ol bedaŭrindan senesperan kazon. Kompreneble, ene de la propraj organizoj, kiujn la koncernaj aktivuloj fondis ĉefe por mem ludi gravan personan rolon en la (alternativa) Esperanto-movado kaj flegi la personkulturon, tipoj kiel Lapenna aŭ Silfer kondukis same aŭtokratiisme (aŭ ekskluzivisme) kiel certaj ‘gvidantoj’ en UEA krom en la centro precipe ankaŭ en orienta Eŭropo, kie la Esperanto-movado devis strikte metiĝi sub la dikton de la ĉiopotenca komunisma partio, kiu konis nenian ideologian toleremon kaj socipolitikan liberecon. La memproklamita maksimumo de la formala neŭtraleco tamen evitis, ke UEA fariĝis ‘para’-komunisma organizaĵo, kvankam en ĝi klare dominis politike maldekstre orientataj fortoj (praktike ĉiuj ĝiaj signifaj prezidantoj estis maldekstruloj), kiuj sen ajna dubo simpatiis kun la marksismo, socialismo kaj komu-nismo, kaj kvankam la socialismaj landoj klopodis tiri ĝin sur sian flankon. Ĉar la sovetiaj regantoj en Moskvo tamen suspektis UEA-n speco de okcidenta agente, la “Asocio de sovetiaj esperantistoj” (ASE), fondita en 1979, neniam povis aliĝi al UEA kiel Landa Asocio.¹⁴⁶ Nature, ĉiuj tiuj kaj similaj aspektoj de la movado neniam estis publike diskutataj sur la paĝoj de *Esperanto*, kiu esence restis ste-rila propagandisma oficiala organo por senkritike distrumpeti la laŭŝajnajn sukcesojn kaj progresojn de la Esperanto-movado, kion cetere faris en principo ankaŭ ĉiuj aliaj Esperanto-gazetoj ĝis nun.

Unuafoje post sia eksiĝo Ivo Lapenna aperis sur la paĝoj de *Esperanto* en junio 1982. En Münster (Germanio) okazis kunsido kun Lapenna, **Helmar Frank**,¹⁴⁷ **Anna Brennan**,¹⁴⁸ Corsetti kaj Maertens por diskuti komunan planadon de la 100-jara jubileo de Esperanto en 1987, kiu devis esti pompe festata en Varsovio, Pollando. Sekelj verkis artikolon pri Esperanto kaj la Movado de Nealiancitoj, kiu ŝajnis trovi intereson en Irano, kaj Saheb-Zameni traktis la temon islamo, Irano kaj Esperanto. Ĉi tiu tutmonda evoluo kaj la „Uneskismo“, kiu eble ne plaĉis al ĉiuj sobroluloj, kiuj trovis la „ismemon“ ligatan kun certaj landoj troigita, igis Milojević-on en posta numero komenti laŭ propra maniero la ioman eŭforion de UEA agadi en tiuj landoj.

Periodo Sutton (1984-1986)

En 1983 Sadler retiriĝis post 20-jara UEA-servado. La 1an de majo 1984 Simo Milojević fariĝis nova ĝenerala direktoro de UEA kaj **Geoffrey Sutton**, brita filologo,¹⁴⁹ akceptis la taskon de la nova redaktoro de *Esperanto*. En novembro aperis omaĝo pri Lapenna, kiu fariĝis 75-jara kun jena komento: „La ĉefa merito de prof. Lapenna estas lia kontribuo al la transformiĝo de UEA el kvazaŭ sekteca privata organizaĵo en internacie respektatan movadon, forte ligatan al la ideoj de Unuiĝitaj Nacioj.”

Ŝajnas, ke Sutton enkondukis la detalan evento-kalendaron en la revuo *Esperanto* kiel ĝi ekzistis dum multaj jaroj. La ĉefaj regulaj kontribuantoj de la revuo estis krom Tonkin, Blanke, Sekelj, Lins, Sutton, Auld, Despiney, Piron, Reto Rossetti, van Themaat, Corsetti kaj Maertens ankaŭ **Spomenka Ŝtimec**,¹⁵⁰ **Hans Michael Maitzen**,¹⁵¹ **Osmo Buller**,¹⁵² **Christer Kiselman**,¹⁵³ **Amri Wandel**,¹⁵⁴ **Angel Todorov**,¹⁵⁵ **Alfred Schubert**,¹⁵⁶ **Martin Haase**,¹⁵⁷ **Mauro Nervi**,¹⁵⁸ **François Lo Jaco-**

¹⁴⁶ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Asocio_de_Sovetiaj_Esperantistoj.

¹⁴⁷ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Helmar_Frank.

¹⁴⁸ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Anna_Löwenstein.

¹⁴⁹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Geoffrey_Sutton.

¹⁵⁰ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Spomenka_Ŝtimec.

¹⁵¹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Hans_Michael_Maitzen.

¹⁵² Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Osmo_Buller.

¹⁵³ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Christer_Kiselman.

¹⁵⁴ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Amri_Wandel.

¹⁵⁵ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Angel_Todorov.

¹⁵⁶ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Alfred_Schubert.

¹⁵⁷ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Martin_Haase.

¹⁵⁸ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Mauro_Nervi.

mo,¹⁵⁹ k.a. – do ŝajne la plej kompetenta intelekta elito de la Esperanto-movado. Malgraŭ ke la revuo estis sufiĉe bone farata, en la UK Auĝsburgo leviĝis kritikoj pri la enhavo de la organo, kiu havis mezan eldonkvanton de 7800 ekzempleroj. Inter alie oni opiniis, ke aperas tro da recenzoj. En la Estrara raporto estis eĉ notite, ke „kvankam la redaktoro planas novigojn, li interpretas la ĝeneralan pasivecon de la legantoj kiel signon de kontento.“ Videble frustrita de tia kritiko, Sutton repafis kaj serĉis la kulpon ĉe aliaj: „Malfacile estas trovi kompetentajn verkemulojn. La rikolto de uzebla materialo estas minimuma.“ La julia-aŭgusta numero de 1986 estis la plej lasta sub la respondeco de Sutton. Buller/Milojević, kiuj ŝajne iom ĉagrenitaj raportis pri la „subita kapitulaco“ de Sutton, devis provizore transpreni la redaktadon ekde n-ro 969. La situacion komplikis la dungo de nova grafikisto kaj la ŝanĝo de la kompostejo.

En tiu tempo aperis granda anonco de la t.n. “Homara Asocio” kun citaĵo de la nobelpremiito C.H. Townes, laŭ kiu „Ne la forigo de la nukleaj armiloj kondukos al paco, sed la paco kondukas al la forigo de la nukleaj armilkvoj“. Lins dediĉis longan artikolon al la kontribuo de UEA al la monda paco, kaj nelaste oni fiere anoncis, ke nun ankaŭ Kubo, kie aperis Esperanto-poŝtmarko, havas „amasan movadon“ kaj kie la fifama ŝtatestro Fidel Castro Ruz deklaras sin “soldato de Esperanto” okaze de la 75a UK en 1990 en Havano, dubinda honoro furore aplaudata de la esperantistaro.¹⁶⁰

Periodo Fettes (1987-1991)

La monatojn inter oktobro kaj decembro 1986 Buller redaktis la revuon kun **Mark Fettes**,¹⁶¹ juna sciencisto, kiu loĝis en diversaj anglalingvaj landoj. Do, estis li, kiu en 1987 transprenis la redaktadon de la revuo, ekde ĝia numero 973. Pri la sinteno al la angla lingvo Fettes skribis en unu el siaj unuaj artikoloj: „Ne estas la devo de ni kiel esperantistoj kontraŭbatali la uzon de la angla kiel internacia lingvo. Tion kion ni devas fari estas sciigi la homojn pri la ekzisto de pli universala mondlingvo, kiu respondas al pli profundaj kaj vastaj postuloj, kaj ebligas komunikadon en la kadro de kulturo ne simple neŭtrala, sed pozitive egalisma kaj tutmondisma. En tiu kadro Esperanto ne konkuras la anglan aŭ iun alian lingvon, ĝi restas senrivala.“ Kaj Tonkin, kiu ekde 1986 denove estis prezidanto de UEA, komprenis, ke „en la nuna mondo ne plu sufiĉas la sloganoj, ĝi postulas konkretajn faktojn.“ Grandan retrospektivon pri al revuo *Esperanto* Fettes faris en la sekva jaro de la 100-jariĝo de la lingvo Esperanto. Lapenna vojaĝis al Ateno, la „centro de la homara civilizo” kaj tie prezentis en la ĉeesto de la atena vicurbestro forgesitan sed memorindan alparoladon pri libereco, demokratio kaj homaj rajtoj.¹⁶² La 15an de decembro 1987, en la Zamenhofa tago, li forpasis en Kopenhago.

Kvankam multaj agadoj ŝajnis evolui kontentige, Blanke plendis pri la „ĝenerala nekontentiga situacio“ de la esperantologio, kiu laŭ li ŝuldiĝis ne nur al la esperantologoj mem, sed unuavice al la manko de lingvopolitika kompreno en la Esperantlingva komunumo. Laŭ li regas i.a. „hazardeco, nesistemeco, malrapideco, hobieco, manko de konscio pri prioritataj taskoj, manko de materia bazo.“ Cetero, en tiu jaro per la morto de Neergard oni perdis signifan esperantologon.

En 1990 la revuo *Esperanto* ricevis novan grafikan aspekton precipe laŭ la titolo. Fine de 1991 Fettes, kiu cetere enkondukis la rubrikon ‚Reagoj’, demisiis kiel redaktoro, sed eniris la estraranon de UEA kiel respondeculo pri informado (ĝis 1998). En siaj iom amaraj adiaŭaj vortoj, Fettes skribis, ke li „foriros kun miksitaj sentoj.“ „Brilo kaj tenebro interludas en mia memoro. Venkoj kaj frustraj, amikecoj kaj konfliktoj, engaĝo ka izolo“, apartenis al liaj spertoj. Tamen, la bilanco de la periodo Fettes ne estis malbona. Sendube, la intelekta nivelo de la revuo altiĝis, oni ne perdis la rigardon al la politika aktuala ĉefe koncerne la kampojn, kiuj povis interesi UEAn, kaj la aŭtoro ankaŭ ne hezitis doni personan tonon, do la engaĝata redaktora ĉeesto en la revuo forte sentiĝis, eble en iom pli akra maniero ol en la tempo de Milojević. El nuntempa vidpunkto oni ne komprenas, kial Fettes eniris la UEA-estraron sub tiaj premisoj kaj kiel eblis, ke li tiel longe eltenis en ĝi.

¹⁵⁹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/François_Lo_Jacomo.

¹⁶⁰ La ĝenerale konataj sistemaj grandskalaj lezadoj de la homaj rajtoj sub la fanatika revoluciulo Fidel Castro kaj lia komunisma partio en Kubo estis ĉiam prisilentataj de la Esperanto-movado, neniu kuba esperantisto iam ajn traktis tiun temon.

¹⁶¹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Mark_Fettes.

¹⁶² Vd. <https://www.youtube.com/watch?v=8saWoFXarvo>. Tie li faris ankaŭ interesan prelegon pri komunisma kaj Stalin, vd. <https://www.youtube.com/watch?v=ZN-MZQEg8xs>.

Paralele al la tradicia doktrino, kiun UEA disvastigis, en julio 1988 estis publikigitaj la “Konkludoj de Segedo” kiel rezulto de la diskutoj dum internacia konferenco pri la temo „Esperanto en la dua jarcento“, organizita de Hungara Esperanto-Asocio kaj Kooperativo de Literatura Foiro, sub la „aŭspicio“ (ŝatata etikedo por atribui gravecon al iu aranĝo) de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, en Segedo / Szeged (Hungario). La manifesto emfazis la gravecon de konstantaj interpersonaj neformalaj kontaktoj kaj la „hejmecan“ etoson, kiujn garantias la lingvo Esperanto, kiu funkcias kiel alternativa modelo de novtipa socimovada organizaĵo por homoj, kiuj „pensas globe kaj agas loke“, kio estas karakteriza por esperantistoj kaj kio distingas ilin de tradicie pensantan neesperantistoj. „Konsekvence, ekzemple, unu el la ĉefaj valoroj de Esperantio, la samideana solidareco transnacia, funkcias nur se oni perceptas Esperantion en sia komunuma faceto“ kiel en Pasporta Servo, Esperanto-familio kaj Esperanto-Kulturcentroj (kiel Greziljono).¹⁶³ Nature, tiu ĉi teksto ne aperis sur la paĝoj de la revuo *Esperanto* kaj oni ankaŭ ne raportis pri la konferenco mem, ĉar UEA evidente UEA ne sentis sin koncernata de ĝiaj konsideroj. Anstataŭ tio Fettes aperigis la „Manifeston pri lingvo-politiko“ de la „partio“ „Esperanto“ Radikala Asocio (ERA) en Romo kaj ĉerpis el „eseo“ de la rusa esperantisto Aleksandr Fjodorov, cetere kun apudaj fotoj de Vilmos Benczik kaj Giorgio Silfer, pri la temo „kia strategio por la Esperanto-movado“, kiu enhavis jenan fanfaronan frazon: „La Esperanta komunumo havas kolosajn potencojn kaj avantaĝojn kompare al iuj ajn naciaj kulturportantoj kaj la Esperanta kulturo havas ĉion por fariĝi avangardo kulturporta en monda skalo.“

Krom tio aperis raporto pri alia konferenco en Hungario, kiu estis ligata al la „Hungara Informadika Instituto Societo Neumann“, kie iuj lingvistoj kunvenis kaj kie Esperanto „diversmaniere rolis“. Alia artikolo estis dediĉita al la akupunkturo en Pekino. En la rubriko „Laste aperis“ oni prezentis sovietiajn propagandajn broŝurojn kun artikoloj aŭ paroldoj de Miĥail Gorbaĉov, kiuj aperis ankaŭ en Esperanto. En kulmine patosa deklaro de la Honora Patrona Komitato de UEA diversaj subskribintaj eminentuloj (kiel Ralph Harry) rekomends al la „registaroj, aŭtoritatoj kaj instancoj en ĉiuj landoj, kaj al la sekretariatoj de interregistaraj kaj neregistaraj internaciaj organizaĵoj kaj ĉiuj profesiuloj“ lerni Esperanton kaj „ebliĝi ĝian enkondukon en la lernejojn de la mondo“. La fanfaronado havis neniun limon.

Okaze de la 40-jariĝo de la „Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj“ la aŭstralia diplomato Ralph Harry memorigis pri la tempo de la diktaturoj dum la dua mondmilito, kiam esperantistoj estis persekutataj, sed ia traktado de la aktualaj problemoj de la homaj rajtoj en la mondo komplete mankis, kvankam li menciis „lingvan diskriminacion“ kaj „liberecon de la religioj“ en ĝenerala formo. Tiu stilo estis karakteriza por UEA, kiu konsideris sin politike neŭtrala kaj ne tuŝis konkretajn homrajtajn kazojn en unuopaj landoj, ekzemple la sorto de la aborigenoj en Aŭstralio kaj Novzelando aŭ de la indiĝenoj de Kanado dum la „periodo Fettes“. Ankaŭ aliaj prezidantoj de UEA, kiuj estis ĉefe komunistoj kaj kriptokomunistoj, neniam kritikis la mizeron de la homaj rajtoj en la propraj landoj, dum ili emis montri per la fingro sur aliajn kulpulojn, havante en sia menso ekzemple la „anglan aŭ francan koloniismon“ aŭ „usonon (kulturan kaj lingvan) imperiismon“. Ankaŭ Popola Ĉinio aŭ Irano, kie la homaj rajtoj estas krude subpremataj, neniam estis kritikataj de la memproklamitaj Esperanto-apostoloj de la homaj (lingvaj) rajtoj.

En longega kontribuaĵo pri la „Strategia Plano“ oni analizis fortojn kaj malfortojn de UEA kaj inter la fortoj menciis la fidon kaj lojalecon de la asociaj membroj, la fakton, ke eblas komunikiĝi kun ĉiuj membroj en ĉiuj partoj de la mondo per unusola lingvo kaj la ekziston de landaj asocioj, multaj instruistoj kaj Universalaj Kongresoj. Kiel ĉefaj mankoj estis nomitaj la profesia agado, lerniloj kaj instruiloj, taŭgaj integrigaj strukturoj, tro malmultaj membroj, nesufiĉaj financaj rimedoj kaj troa ligiteco de UEA al Eŭropo.

Kun preskaŭ 6000 partoprenantoj (aŭ aliĝintoj la 72a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en la giganteska stalinisma Palaca de la Scienco kaj Kulturo de Varsovio (Pollando) estis la plej amasa evento en la historio de la Esperanto-movado,¹⁶⁴ pri kiu ankaŭ *Esperanto* abunde raportis. Ĉi tiu kongreso estis samtempe ankaŭ ĝia kulmino. Fakte, en tiu jaro ankoraŭ neniuj povis scii, ke du jarojn poste la komunismaj reĝimoj de orienta Eŭropo kolapsos kaj kun ili la socialismaj landoj mal-aperos. 1989 estis samtempe historia cezuro ankaŭ pro la Esperanto-movado. Ekde 1990 la membro-nombro

¹⁶³ Vd. <http://www.esperantio.net/index.php?id=11>.

¹⁶⁴ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Universala_Kongreso_de_Esperanto.

de UEA draste falis de jaro al jaro,¹⁶⁵ tiel ke la ŝrumpo kaj degenero de la Esperanto-movado progresis rapide kaj nehaltigeble. Neniam plu la Esperanto-movado reatingis la „gloron“ de antaŭaj tempoj. Kune kun la komunismo, kies alpendaĵo la Esperanto-movado estis, ekzemple en Bulgario la iam amasa kaj furora Esperanto-organizo preskaŭ komplete malaperis. Ne esence pli bona estas la situacio en aliaj landoj, kie la Esperanto-movado iam estis sufiĉe populara kiel en Pollando, Hungario, Ĉinio, Irano k.a. Kvankam la novaj mastroj de UEA intertempe kalkulis pri la renoviga forto de la interreto, la kvanta renaskiĝo de la Esperanto-movado ne okazis, dum pli kaj pli formortas la iamaj pioniroj de la movado, kio kontri-buas al la neevitebla erozio de tiu movado, kiu strebas esti agnoskita kiel “nematerra kultura hereda-ĵo”, komence en unuopaj landoj (kiel Pollando kaj Kroatio) kaj poste fare de Unesko sur monda skalo, kio estas tamen iom dubinda. Sed ankaŭ tio ne savus Esperanton. Eĉ se tio okazus, oni devos timi, ke la Esperanto-movado estas pasinta afero kaj ke la lingvo Esperanto elmortos kiel unu el miloj da senesperaj idiomoj de elvaporigantaj popoloj vivintaj en Eŭropo, Afriko, Azio, Norda kaj Suda Ameriko kaj Aŭstralio. Esperanto impreso kaj unike montris, ke artefarita planlingvo povas reale funkcii kiel homa komunikilo, ne pli. La homaro ne volis enkonduki ĝin kaj la t.n. esperantistoj, inter kiuj la plej sovaĝaj fanatikuloj fuĝis la projekton pere de sektema maniero propagandi kaj diletante apliki ĝin.

Periodo Ertl (1992-2001)

Inter 17 kandidatoj estis elektita **István Ertl**, hungardevena esperantisto de 1977, kiu logis en Francio aŭ Luksemburgo.¹⁶⁶ Sian intelektan talenton kaj emon al literaturo li povis pruvi senprokraste per la redaktado de speciala numero al Gaston Waringhien, kiu forpasis en decembro 1991. Kiam en januaro 1993 mortis ankaŭ Juan Regulo Pérez, Ertl pretigis elstaran eldonon dediĉe al tiu eminenta esperantisto el Kanariaj Insuloj.

Kun la numero 1066 en januaro 1995 *Esperanto* ricevis radikale renovigitan veston. Ĉefa aŭtoro de tiu modernigo estis **Francisko Veuthey**.¹⁶⁷ Per tiu „pli ŝika ekstero“ la gazeto daŭrigis sian vojon en la estontecon.

Ertl estis tre serioza redaktoro. Li ne nur ambiciis prilabori ĉiujn informojn ricevatajn de la CO, sed li reenmetis pli da temoj pri lingvoj, lingva demokratio, k.s., klopodis doni emfazon al kulturo kaj literaturo. Pluraj intervjuoj, ekzemple kun **André Martinet**,¹⁶⁸ **Umberto Eco**,¹⁶⁹ **Reinhard Selten**,¹⁷⁰ **István Nemere**¹⁷¹ donis fortan personan noton. Tre gravis por Ertl, ke la revuo estu lingve senripoĉa, pro kio li mem profunde redaktis la ricevatajn tekstojn (kio estis iom malfacila ankoraŭ en tempo komence seninterreta). Nu, la volo trakti ĉiujn temojn eble kaŭzis ioman perdiĝon en temprioritatoj, krome okazis kronika malfruo en la aperitmo.

En 2002-13 la revuon *Esperanto* redaktis-kompilis la amatora ĵurnalisto **Stano Marček** en Slovakio.¹⁷² Poste ĝi estis redaktata de aktivuloj el Brazilo, Hungario kaj Ruslando. La intelekta kaj ĵurnalisma nivelo falis pli kaj pli parte ĝis la nulpunkto favore al senkritika raportado kaj idiotisma propagando.

En la aprilaj aŭ majaj eldonoj de *Esperanto* kutime aperis statistikoj pri la membraro de UEA, kiuj indikis zigzagan linion kun stagna-fala tendenco. Laŭ tio, en la jaroj 2011-18, kiuj kongruas esence kun la prezidanteco de Mark Fettes, UEA havis 5321 (2011), 5046 (2012), 4903 (2013), 5027 (2014), 5501 (2015), 4365 (2016), 4501 (2017) kaj 4581 (2018) individuajn membrojn kaj 15801 (2011), 15103 (2012), 14922 (2013), 14816 (2014), 14716 (2015), 13054 (2016), 13071 (2017) kaj 13106 (2018) membrojn entute (kun aligitaj kaj junaj aligitaj membroj). En 2018 la financa defecito de la asocio drame akriĝis, tiel ke oni devis ekdiskuti pri drasta ŝparado kaj maldungo de oficistoj en la

¹⁶⁵ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Membronombroj_de_UEA.

¹⁶⁶ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/István_Ertl.

¹⁶⁷ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Francisko_Veuthey.

¹⁶⁸ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/André_Martinet.

¹⁶⁹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Umberto_Eco.

¹⁷⁰ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Reinhard_Selten.

¹⁷¹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/István_Nemere.

¹⁷² Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Stano_Marček.

Centra Oficejo en Rotterdamo. Ĉar la prezidanteco de Fettes finiĝis en 2019, devis esti prezentitaj novaj kandidatoj, kion la komitato de UEA faris per **Duncan Charters** (Usono)¹⁷³ kaj **Fernando Maia** (Brazilo).¹⁷⁴ La elekto okazos en julio de tiu jaro. A. Künzli 2013/19

Kelkaj rimarkoj pri la aktuala stato de la vikipediaj resursoj en Esperanto:

Okaze de la revizio de la ĉi-supra teksto (kiu estis verkita en 2013) estis kontrolita ankaŭ la aktuala stato de la vikipediaj resursoj en Esperanto laŭ elektitaj biografiaj ligitaj kun nomoj menciitaj la teksto, sekve al kio estis aldonitaj en la piednotoj la ĉi-supraj ligoj al unuopaj artikoloj en la esperanta Vikipedio.

La konkludo estas grandparte negativa. Al la plej multaj artikoloj mankas substanco kaj ĝisdatigo de la enhavo, tiel ke oni devas konsideri ilin plej ofte maltaŭgaj por scienca uzado. Ŝajnas, ke mankas kaj la interesiĝo kaj la tempo kompletige prilabori tiujn artikolojn, tiel ke ili postlasas la impreson, ke ili estis kreitaj ĉefe kun celoj de la Esperanto-propagando. La ligoj al la vikipediaj biografioj do ne estis aldonitaj kun la celo utile kontribui al la ĉi-supra teksto, sed por montri la aktualan staton de la vikipediaj resursoj en Esperanto, kiu estas ege nekontentiga. Oni devas konstati, ke la esperantaj vikipediistoj evidente nenion lernis el kritiko farita dum la pasintaj jaroj. Estas klare, ke tia malserioza traktado de la biografia laboro fare de la esperantaj vikipediistoj ne povas altigi la reputacion aŭ prestiĝon de Esperanto. (Necesas ĉi-okaze aldoni ankaŭ la rimarkon, ke en aliaj lingvoj la stato de la kvalito de la vikipediaj artikoloj ofte estas eĉ pli malbona).

La plej malfavoran impreson postlasis la kontribuado flanke de la german-nederlanda “historiisto” M. Sikosek-van Dijk, kiu strebis aldoni ĉefe la proprajn referencojn (kaj eble ankoraŭ tiujn de la oficiala UEA-kronikisto Lins) al la koncernaj artikoloj, krude ignorante la kontribuadojn de aliaj aŭtoroj (ne nur de Künzli), kiujn oni povas aŭ devus konsideri.¹⁷⁵ Ĉi tia egoisma sinteno estas tipa por certa speco de akademiuloj kaj ankaŭ certa speco de esperantistoj, kiuj ĵaluze rigardas la laboron de iuj aliaj pli kertiikaj kolegoj por finfine kredi, ke oni povas ignori ĝin.

Koncerne la solvon de la -ata-/-ita-demando, mi ĝenerale orientiĝis laŭ la germanlingva modelo (war/wird/wurde depende de la tempo, plej parte pasinteco). Sed la tuta problemo estas komplikata/ita per la dimensioj de la adjektiva, tranzitiva kaj verbaspekta demandoj. Do, restas dubo en kelkaj kazoj (devigita/ata, akompanita/ata, miskom-prenita/ata, konsiderita/ata, nomita/ata, imagita/ata k.s.), pri kiuj oni povas verve diskuti.

© www.planlingvoj.ch / www.zamenhof.ch, 2013/19.

Pri la aŭtoro: nask. en 1962 en Lucerno (Svislando). Studis (1983-91) slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la zurika universitato. Finis la studojn per diplomverkaĵo pri la historio de Esperanto kaj interlingvistiko en Ruslando kaj Sovetunio. Aŭtoro de la Svisa Enciklopedio Planlingva (2007) kaj de Zamenhof-biografio en la germana lingvo (2010). Vivas en Berno (Svislando). Lernis Esperanton en 1979 kaj estis aktivulo de la Esperanto-movado, kiun li intertempe forlasis pro ideologiaj kaj politikaj konsideroj, sed daŭre praktikas Esperanton, verkante historiografie pri esperantomavadaj, planlingvaj, orienteŭropaj, politikaj kaj lingvaj temoj.

¹⁷³ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Duncan_Charters.

¹⁷⁴ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Fernando_Maia_Jr.; vd. <https://www.liberafolio.org/2019/04/14/du-kandidatoj-por-la-prezidenta-posteno-de-uea>.

¹⁷⁵ Kiel ekzemplon oni povus nomi la vikipediajn artikolojn pri Hector Hodler.